

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
P. P. K.
P. P. K.
KOMITATO

REDAKTEJO: Ben. K. K.
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

2^A JARO

N^O 1-2

JANUARO-FEBRUARO 1926

Jara Abono

Belgujo 2,50 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.

Unu Numero

” 0,25 Bfr.

” 0,60 Bfr.

Informo

Ni prokrastis la aperigon de tiu ĉi duobla numero ĝis post la ĝenerala jarkunveno de A.P.P.K. okazinta la 4^{an} de februaro, por ke ĝi povu enhavi la raportojn pri nia agado dum la jaro 1925.

La redakcio.

1926

Antaŭ ĉio A. P. P. K. esprimas siajn tutkorajn bondezirojn por feliĉa jaro al siaj multnombraj geanoj kaj subtenantoj. Al ĉiuj ni precipe deziras la necesan kuragon kaj fortan volon por daŭrigi la entuziasme komencitan laboradon.

Nia Bulteno nun eniras sian duan jaron. Se ni komparas la lastan numeron de la unua jarkolekto kun la unua, ni fiere konstatos ke dum la mallonga tempospaco de sia ekzistado ĝi multe plibonigis tiom laŭ aspekto kiom laŭ enhavo. Ni certe ne asertas ke la

Bulteno plenumis ĉiujn dezirojn, sed ni faros nian eblon por daŭre plibonigi ĝin. Kvankam ĝi malklare respeguli la agadon de la Antwerpen'a esperantistaro, tamen ĝi montris ke ne vivas, ke ni senĉese laboradas por atingi la fincelon. Malfortaj povas esti niaj klopodoj, ĝojiga fakto tamen estas konstato ke nia Bulteno, same en la eksterlando kiel en la lando mem, iĝis bonvena amiketo, kiu regule venis por subteni la kredon en nia komuna idealo.

Laŭ la aproboj ricevitaĵoj el diversaj flankoj ni rajtas konkludi ke A. P. P. K. eniris la ĝustan vojon. Dank' al la unuigitaj fortoj ni precipe sukcesis plifirmigi la oficialan instruadon de Esperanto en la urbaj vesperlernejoj, fakto kiu certe estas menciinda en la historio de nia kara lingvo.

Plej kontente ni povas reregardi al la pasinta jaro kaj plej certaj pri novaj venkoj ni eniru la novan!

1925 mortis; vivu 1926!

A.P.P.K.

Raporto pri la jaro 1925*

Je la komenco de nova jaro oni ĉiam havas la inklinon revizii la laboron faritan dum la pasinta jaro. En ĉia movado, unu jaro signifas mejloŝtono sur la longa vojo ankoraŭ ŝirironta. Sed ĉiu mejloŝtono signifas ankaŭ la loko, kie oni atendas iomete, ripozas por ririgardi la jam ŝiriritan parton de la vojo kaj kolekti novan kuraĝon por ŝiriri la pli kaj pli malebenigantan vojon - kondukanto al fina celo.

En tiu signo staras ankaŭ nia jarkunveno. Malgraŭ ke nia komitato ekzistas jam proksimume du jarojn, okazas nur hodiaŭ ĝia unua jarkunveno, kiel sekvo de novaj statutoj. Se ekzistis do statuoj, vi demandos. Jes!, ĉar la bazo sur kiu la statutoj, nun estas kunmetitaj, estis jam fiksita dum la starigakunveno de la 22^o de Julio 1924*. Se tiu bazo tiam ne estis priskribita sub formo de statuoj, tamen nia agado ĉiam estis direktita per ĝi, kaj ni estis plenumintaj ĉiujn decidojn gvidataj per la memdisciplino. Persone mi plej ŝatis tiun labormanieron, sed en la lasta jaruono sentigis inter la membroj timo por ia dangerone difinita, kiu instigis nin priskribi per statutoj la tiam tempefiksitan bazon.

Sekve de tiu statutoj mi estas ankaŭ devigata prezenti al vi jarraporton. Ne imagu, karaj aŭdantoj ke mi mencias ĉion, -punkton post punkto-, kio okazis dum pasinta jaro; mi nur preterpanigos en revuo la gravajn okazintaĵojn. **LA BULTENO.**— En la lastaj monataj de la jaro 1924a sentigis pli kaj pli la neceson aperigi bultenon, kiu servos kiel ligilo inter la aliĝintaj grupoj kaj membroj. La unuan monatan de la pasinta jaro ĝi aperis. Malgraŭ ĝia bona enhavo, ĝi tute ne bona aspektis, kaj mi dirus malveron dirante, ke ĝi tute kontentigis nin. Sed plendi kaj ne agi ne estas nia devizo. Ĉiu agis laŭpove kaj en Julio, -monato de nia datreveno, nia bulteno aperis en nova vestaĵo, per kiu ĝi rajtas esti konsiderata nun kiel vera poresperanto propagandilo.

Laŭ aspekto kaj enhavo ĝi povas konkuri nun kun multaj jam malnovaj esperantaj organoj.

La bulteno estis sendita al diversaj ekster-kaj en landoj grupoj, al ĉefuloj el nia movado kaj al diversaj alilandaj revuoj kaj gazetoj por interŝango. Mi nur volas citi unu malagrablaĵon en tiu afero, ĉar ĝi estos memorinda por la posta historio de la loka movado. Inter alie la Direktoro de B. E. ricevis ĝin depost ĝia apero. Dekdufoje li ricevis du n'jn por recenzo; li tute ne plenumis tiun moralan devon kaj eĉ ne menciis la ricevon.

La lasta monata kunveno decidis plialtigi la eksterlandan abonprezon al fr. 6.— kaj konservi la ĝisnuman enlandan prezon, kondiĉe ke la pres-kaj afrankostoj ne plu plialtiĝus.

Nia bulteno ekmontrigis necesa; fariĝis parto de nia korpo kaj ĝia malapero eble sekvigis la disigon de nia komitato. Ĝi estas la vera intergrupa ligilo kaj ni ne forgesu do koncentrigi niajn fortojn-por ĝia daŭra eldono- tiel por la financa kaj por la redakta parto.

Mi profitas je tiu okazo por sendi, je la nomo de A.P.P.K. niajn tutkoran kaj sinceran dankon al la komitato por Socia Laboro (Sekcio de la Diamantista Sindikato) kiu en tiu kaj aliaj aferoj ĉiam montris sian oferemecon kaj malavare helpis nin dum tiuj por ni malfacilaj momentoj.

EKSKURSO.— En la monato de majo la grupoj aliĝintaj al A.P.P.K. ekskursis al Bergen op Zoom, kie ni estis akceptitaj de la urbestro. Malgraŭ la tradicio nur permesis al li akcepti naciajn sed ne lokajn grupojn li tamen rompis unu fojon kun tiu tradicio pro la bela interna ideo de nia movado. En tiu ekskurso ankaŭ partoprenis-krom ge'j el Mechelen kaj Lier,- la Flandrema Grupo Esperantisto. Fakto notinda estas, ke malgraŭ ĝia nealiĝo, tiu grupo ege simpatias nian komitaton. Ni havu bonan esperon, ke ĝi ankaŭ anigu baldaŭ. Reciproke la grupo el B.o.Z. vizitis nin en la monato de Julio. Kelkaj tagoj poste nia gruparo ekskursis al Hemixem. Sed ne estis tiam simpla ekskurso. Festeno vokis nin tien! kaj nide ni festis nian unuan datrevenon. Kelkaj eksterlandaj sam partoprenis kaj la grupo Nia Ideo plenanime prigorgis la muzikon kaj kantadan parton. Nia anazo estis denove invitita al Hemixem en

la komenco de septembro por la kermesaj festoj. Detalaj raportoj pri tiu ekskursio troviĝas en la n^o 7, 8, 9, 10^o de la Bulteno. Sed ne nur la varmaj tagoj logis nin elurben, eĉ je la fino de novembro niaj anoj ne timis iri al Lier por dissemi la bonan semon. La komitato ankaŭ aranĝis vizitado al diversaj urbaj muzeoj sub gvidado de kompetentulo. Tiamaŭniere ĝi propagandis por Esperanto prizorgante samtempe distraĵojn por siaj geanoj.

PROPAGANDO KAJ KURSOJ.—

Kvankam Esperanto jam estis enkondukita en la vespera instruado, sekve de nia antaŭjara agado, ni ne ĉesis la propagandon por penetri pli profunde en la publika instruado. Dank'al nia senĉesa laboro nun funkcias du perfektigaj kursoj flanke de la aliaj, gvidataj de oficiale pagatoj instruistoj. Tio estas realaĵo, kiun oni dankas al nia senorofita intergrupa kunlaborado. Antaŭ la komenco de la kursoj nia komitato aranĝis dusemajna ekspozicion-jam la dua publika- en la montrafenestro de la Gaz C^o. Diversfoje sciigoj kaj artikoloj pri nia agado aperis en la urbaj journaloj. Nenian okazon por propagandi ni flanken lasis. La komitato presigis migrantoj-kaj vidkartojn. La unuajn estas multfoje menditaj el la eksterlando, kaj la vendado de la duamenciitaj - la vidkartoj - tiel sukcesis, ke ni estis devigataj presigi duan serion ĉar la unua ege rapide estis elvendita. La mono estis kolektita de la membroj, per tre simpla metodo. La komitato eldonis akcietojn po fr. 5.— repageblaj kiam la vendado tion permesos. La repago jam okazis; tio pledas do por la sukceso. Per niaj bonoj zorgoj estas presita ankaŭ bona franclingva lernolibro, kaj ni estas penantaj havigi al ni la similan lernolibron por niaj flandralingvuloj. La anoj kiuj siu okupis pri tiuj fakoj raportos mem pri la financa parto. Granda venko por ni estas: la eldono de la urba esperantlingva propagando faldkartoj. Tiu sukceso ni precipe ŝuldas al unu el niaj plej estimatoj membroj kiu ankaŭ prizorgis la tradukon. Ĝi estas multfoje demandita de eksterlandanoj. Kelkaj el niaj anoj, partoprenintoj en la 17a Ua Ko,

disdonis ĝin en Ĝenevo la tagon post tiu, kiam la kongreso elektis nian urbon por la 20a. La fakto de tia-ĝis tiam ne konatarapidega kaj efika propando ege impresis la kongresanojn. Niaj nelacigeblaj-anoj propagandis en ĉiuj direktoj i. a. Y. W. C. A. kaj Y. P. T. T. Z. k. t. p. Peto por aniĝo estis senditaj al la Flandrema kaj Policista grupo. La cirkonstancoj antaŭvidigas, ke baldaŭ tiu lastenomita grupo eble pligrandigos nian gruparon.

UNIVERSALA KONGRESO.— Tuj post la kongreso en Wien nia komitato prenis la iniciativon inviti delegitojn de la lokaj grupoj kaj kelkajn malnovajn sam oin por interparoli la eblecon invita la 17an Uan Kon. Malgraŭ ke ni jam havis duonoficialan moralan kaj financon subtenon oni opiniis atendi ankoraŭ 2/3 jarojn pro la tiam malbona interlanda malkonsento. Ĝenevo tiam akceptis. Estis do grandega surprizo kaj samtempe kontentigo por niaj ĉeestantoj anoj aŭdi, ke Antwerpen estis elektita kiel la 20a kongresurbo, decido kiun ni povas konsideri do kiel sukceso de nia antaŭjara agado. Sekve de tio nia komitato aperigis, en la monato ke septembro, artikolo plejanta por ĝenerala intergrupa kunlaborado. Nenia voĉo respondanta audigis. Kelkaj estraranoj kaj membroj persone jam klopodis harmoniigi la diversajn grupojn. Vana laboro. Ĉiuj oreloj; ĉiuj pordoj restis fermataj por mi. La afero ne ankoraŭ urĝas estas la nura respondo per kiu oni serĉas kontentigi nin. Aliflanke estas publika sekreto, ke oni jam estas laboranta. Kio okazas? Neniu scias. Nur la faktoj vidigas, ke oni intencas eĉcepti nian komitaton el tiu vera propagando laboro. Nur tio mi povas raporti al vi kun la peto serĉi la rimedojn, por ke oni ne ŝovu flanken nian komitaton, la nura korpo kiu lastatampe laboregis por la oficialigode Esperanto.

STATUTOJ.— Kiel dirite en la komenco de tiu-ĉi raporto niaj statutoj nun estas priskribitaj donante al ĉiuj samajn devojn kaj rajtojn. En la komenco de oktobro la sekretario estis komisiita fari projekton, tasko kiu ne estis facila. Plenkonscience li konstruis la statutojn sur la bazo aprobata per la starigakunveno, sed tio kaŭzis uraganon en glaso da

akvo. Multaj el niaj subtenantaj membroj-inter kiuj kelkaj tre laboremaj propagandistoj-sentjs nun ion malplena en sia grupa vivo. Post preskaŭ dujara frata kunlaborado-vere inda al nia movado-ili imagis ne plu esti samrajtigitaj pro manko de persona voĉdonrajto. Per la vere tutkora kunlaborado ili tute forgesis, ke nia komitato nur ekzistas el grupoj, kiuj nur rajtas voĉdoni-pere siaj delegitoj-, al kiu izoluloj nur povas aniĝi kiel subtenanta membro. Propono por doni voĉrajton al fiksitaj nombro da izoluloj estis malaprobata pro la principo aprobita per la starigakunveno- la intergrupaj kunlaborado-. La estraro unuanime defendis tiun principon sukcesis konvinki la alipensantojn. La izoluloj ne forlasante tamen sian ideon fondis novan grupon kiu tuj aniĝis al la komitato.

Sekvante de 8a de la statutoj nia sekretario ne plu rajtas esti estrarano kaj ekzigis tuj post la aprobo de la statutoj. Tamen li plenumos sian funkcion ĝis sia anstataŭo.

Nenia grupo ensendis proponon por statusŝanĝo je principa vidpunkto. Ni povas do konsideri ilin konforma al la principo aprobita antaŭ du jaroj.


Tiu-ĉi raporto respogas do konscize kaj proksimume la agadon de nia komitato en tiu mallonga tempospaco. Ne estas la voĉo de la sekretario kiun vi aŭdis, sed tiu de la estraro kiu - pere de li demandas vian juĝon pri sia laboro kaj per la aprobo de tiu-ĉi raporto vi konfirmos, ke efektive ĝi gvidis la komitaton en la bonan direkton. Ĝi nur demandas vian apogon kaj kunhelpon en tiu nefacila tasko.

Ke la spirito de honesteco kaj toleremo animigu la pri-paroladojn, por montri al la eksterstarantoj, ke ni-pacaj batalantoj-vere indas tiun nomon povante flankenŝovi ĉiajn nerilatajn aferojn kaj dediĉi ĉian nian tempon, nian energion al la disvastigo kaj oficialigo de nia kara lingvo!

Ke nia unua jarkunveno laboru en sincera kamaradeco.

Estas kun tiu reale tutkora deziro, ke mi subskribas ĉi-tiun raporton.

La sekretario, A. Posener.



Raporto pri la financa stato de A.P.P.K. (jaro 1295)

Enspezoj		Elspezoj	
Kotizoj	fr. 250.—	Manko (j. 1924)	27.80
Donacoj	142.50	Kurso	111.10
Vend. de kart.	124.—	Bulteno	159.70
Vend. de libr.	119.70	Donaco(ekspo)	20.—
Monskatolo	126.—	Afiŝetoj	25.—
Diversaj	35.50	Migrant. kart.	50.—
Same fr.	797.70	Diversaj	56.60
		Same fr.	450.20
		En kaso je 1.1.26	347.50
			797.70

La kasisto, J. Swalf.


Nekrologio

Ni plenumas la malĝojan devon sciigante al la samideanaro la dolorigan novaĵon pri la morto de s^{ro} Van Ganse, patro de niaj samideaninoj fraŭlinoj A. kaj I. Van Ganse kaj pri la morto de s^{ro} Vereeck patro la nia samideano, s^{ro} J. Vereeck.

Al la funebrantaj geamikoj ni sendas la esprimon de niaj sinceraj kondolencoj.
A.P.P.K.

VOJAĜO de S^{ro} ĈE


La sekretario de Belga Ligo sciigis ke, pro diversaj malhelpantaj cirkonstancoj, S^{ro} ĈE devis prokasti sian vojaĝon al Belgujo ĝis nedefinita dato.



Kongresaj

NACIA BELGA KONGRESO.— La Panne, dum la pentekostaj tagoj (23-24^{an} de majo).

XVIIIa UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto.— Edinburĝo (Skotlando), 31an julio- 7 aŭgusto 1926. Kotizo L 1.



ĈU VI PORTAS...?


Ĉu vi portas nian stelon,
Nian stelon verd-brilantan?
Ĉu vi konas nian celon,
Nian celon esperantan?

Nia stelo verde brilas,
Estis ĉu koloro bela ?
La printempon ĝi similas,
Sub la lum' de suno hela !

Portu ĝin sur via vesto
Sur la brusto radianta !
Donas ĝi al vi atesto,
Ke vi estas hom-amanta.

Se vi estas nur scianta
Nian lingvon, nian celon :
Devas vi sur kor' batanta
Porti la kvinpintan stelon !

Verkis Martin Doklin, (Svedujo),



Grupaj Informoj

* * *

NIA IDEO.- Monata festa kunveno, la 14an de februaro, je la 3a p. m. en Volksgebouw, Meir. Ankaŭ nemembroj povas ĉeesti.

LA REKTA VOJO.- Festvespero kaj balo, la 13an de marto, je la 8a vespere, en la salono Van Wesenbeke, Van Wesenbekestraat. Ĉiuj samideanoj estas invitataj.

* * *

Kie renkontiĝas la Antverpen'aj Esperantistoj ?

A.P.P.K. Jaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A.P.P.K.

Antverpena Polica Grupo Esperantistaj. En la policlernejo, Gildekamersfr.9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hotel Cecil, Van Arteveldestr. 8.

Nia Ideo. La 2an dimanĉon de ĉiu monato, je la 9a matene, en Volksgebouw Meir.

Suda Lumo. Vidu A.P.P.K.



Ricevitaj

Amerika Esperantisto - Il Cantastorie - Hungara Esperantisto - Informoj de Esperanto Asocio de Estonio - International Language - Kataluna Fesperantisto - Liberpensulo - Litova Stelo - Samosa Esperantisto.

ESPERANTO, deklaracio fidela pri la Vero elmontrata laŭ la Sankta Biblio, eldonis G. R. Martin, 43, Calmont Rd., Bromley, Kent, Anglujo. Senpage havebla.


Nogle Oplysninger om Esperanto.- Eldonis Foreningen af Esperanto. Intereseredo, Svedujo.

Katalogo de la Ĉefaj Libroj eldonitaj de Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, Paris (9^e) Francujo.

* * *

Atentu filatelistoj ĉiulandaj.- Send al mi bildpoŝtkartojn el via lando kaj mi tuj resendos al vi per registrita letero tre bonajn brazilajn poŝtmarkojn.

Adresu bone ; skribu legeble ! Rasono Eanes, Miracema, Estado do Rio, Brazilujo.



ŜANĜOJ en la STATUTOJ de A.P.P.K.

Aprobitaj per la jarkunveno de la 4a de febr. 1926

Aldonu ; al art. 6a : La grupoj ricevos la tagordon kun la eventualaj proponoj almenaŭ 2 semajnojn antaŭ la jarkunveno.

al art. 10a 5^e p^o : Almenaŭ 4 semajnojn antaŭ la jarkunsido de A.P.P.K. la aliĝintaj grupoj devos sendi al la estraro la eventualajn proponojn.

al art. 8 : anstataŭ 2 estas nun 3 delegitoj po grupo.

al art. 14: (post la vorto jarkunveno) aŭ eksterordinara kunveno.

OKAZANTAĴAJ

* * *

Boata ekskurso al Vlissingen dum la somero (eble julio)

* * *

Vizito al fama kokinbredejo (eble majo)

Vizito al antwerpen'aj muzeoj.

* * *

Informo

Dum la pentekosta feŝto (23an de majo) okazos en Amsterdam junularkongreso dum kiu okazos ekspozicio de esperant-ajoj.

* * *

Estraro de A.P.P.K.

Estis elektitaj dum la lasta jarkunveno :

Prezidanto, J. Jacobs

Vic-prezidanto, J. De Waegenaere.

1^a sekretario, A. Posener,

2^a sekretario, J. Cats.

Kasisto J. Swalf.

Bibliotekisto, F. Roelants.

Fako' propagando kaj festoj, Fino B. Geers

OKAZINTAĴO

La 16an de januaro «La Rekta Vojo» organizis inaŭguran balon en la salonego de Hotel Cecil. Multopej la dancemuloj alvenis, anoj de la aliĝintaj grupoj al A.P.P.K. kaj ankaŭ multaj neesperant-istoj kiuj simpatias je nia movado.

Kelkaj festantoj estis maskitaj, kaj la jurio havis malfacilan taskon disdoni la premiojn por la plej belaj aŭ plej komik-aj kostumoj, ĉar ĉiuj estis admirindaj! Fine premiitaj estis la tre gracia "Rekta Vojo", la eleganta tualetkvasto, fiera raĝao, mezopoka flandra burĝo, koketa "pierrot", neimitebla "knock-about".

Loterio ebligis ankaŭ al la nemaskitaj gajni belajn premiojn. Je la sonoj de gajiga jazbando, sub pluvo de multkolor-aj serpentumoj, oni dancadis ĝis la dua. Je la disigo aŭdiĝis ĉie: Kiam la dua balo?

* * *

Esperanto en Lernejoj

* * *

Bulgario: La ministerio de la publika instruado per ordono n° 4072 de 18.11.25 kielektoron de Esperanto en la institucio

por blinduloj s-on Asen Grigorov, Sofia, str. Car Boris 69. (Laŭ Bulgara Esperant-isto n° 4.)

Germanujo: La urbo Leipzig pagas 4 Esperantokursojn en popollernejoj. Partoprenas:

38 infanoj ĉe s-o Degen, Leipzig-R., Augustenstr. 15

25 infanoj ĉe Teumer, L. Go., Roblauer str. 1

25 infanoj ĉe s-o Kruger, L. Klzsch., Klingenstr. 31

30 infanoj ĉe s-o Goldberg, L. Co., Klemmstr. 14

—•••••—

MARCONI AŬ POPOV?

* * *

Italaj samideanoj protestis kontraŭ la noto pri la oficiala poŝtmarko kun teksto «Inventisto de Radio—Popov», kiu aperis en novembra „Esperanto„. Evidentas, ke la protesto ne venis al la ĝusto adreso ĉar ni atentigis nur pri la uzo de nia lingvo. Sed, ankaŭ nin ekinteresis la demando, ĉu vere Marconi havas pli da rajto ol POPOV al la gloro esti unua inventisto de l'radio-aparato; foliuminte kelkajn ni trovis, ke nek Marconi nek Popov povas esti nomita unua inventisto de la radio; ambaŭ estas vere inter la inventistoj, kiuj parto prenis en la kolektiva, paŝ-post-paŝa kreo de la radio. Germana fizikisto Hertz eltrovis la elektrajn „ondojn, poste franca fizikisto Branly elpensis la „koherilon,, tubeton kun farfajlaĵo sen kiu ne estis eble konstrui la radio-aparaton (ricevan), kiel sen la unua estis nebla la konstruo de l' senda radio aparato. Poste, kiam teorie la radio jam estis eltrovita (aŭ pli ĝuste: elpensita), venis la momento konstrui kaj funkciigi la aparaton. Nu, la historio, domaĝe por la protestintoj, diras, ke estis Popov, kiu unna konstruis la aparaton (malgrandan) kaj funkciigis ĝin (je malgranda distanco). Fine Marconi refaris la samon en pli granda skalo, kaj li estis unua kiu iniciatis la starigon de Radio - kompanio sur forta industria kaj financa bazo.

(El Esperanto)

—•••••—

BULTENO

MONATA DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA E ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Gen. 1924}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

2^A JARO

N^o 3

MARTO 1926

Jara Abono

Belgujo : 2,50Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.

Unu Numero

" 0,25Bfr.

" 0,60 Bfr.

PROTESTO.

La monata kunveno de la grupoj aliĝintaj al A. P. P. K. aŭdinte la tagordon voĉdonita en la loka jara kunveno de U. E. A. la 10-3-1926 kontraŭ S^{ro} Jacobs, sia prezidanto,

Protestas kontraŭ la malinda konduto de kelkaj antaŭstarantaj personoj en la loka movado;


Konstatas ke la senfunde kulpiga tagordo ne indas nian movadon kaj tute karakterizas la proponinton;

Esprimas sian plenan fidon en sia prezidanto, S^{ro} Jacobs, estante konvinkita pri lia honesta agado;

Deklaras unuanime ĉiam esti preta por solvi amike la lokan malinterkonsenton. kaj daŭrigas la tagordon.

LA SEKRETARIO,

A. Posener.



Pri Abono al nacia Revuo.

El „*Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*”.

Laŭ mia opinio, unue ekzistas s-anoj, por kiuj eĉ 200 Emk. estas tro malfacile kolekti por aboni gazeton. Honti devas ne tiuj, kiuj ne povas aboni, sed tiuj, kiuj ne trapensite bone aferon, kuraĝas tiel akre ataki niajn s-anojn! Nenia enigmo ekzistas, se oni pripensos, ke multaj el niaj s-anoj estas lernantoj, kiuj ne havas propran monon, verŝajne estas ankaŭ nelernantoj, kiuj pro iu ajn kaŭzo ne havas liberan monon.

Due, mi opinias, ke estas ankaŭ s-anoj, kiuj abonas iun nenacian esperantan gazeton, ĉar ĝi estas pli ampleksa, donas pli detalajn sciigojn pri nia movado eksterlande, (Rim. de red. : „*Informoj*” ja ne konkuras kun eksterlandaj gazetoj!) kaj pri nia movado en Estonio oni sciiĝas ankaŭ sen gazeto.


Lasta kaŭzo ne estas tiel defendinda kiel la unua, tamen mi ne povas konsenti

pri malpermeso al tiuj nomiĝi esperantistoj. Ĉar esp. gazeton ili jam abonas kaj por nialandaj aferoj elspezas eble pli multe da mono ol kostas abono al „Informoj”.

Per miaj vortoj mi ne volas defendi neabonon al „Informoj”, tute ne! Mi nur volas diri, ke tiom kruela atakado estas sama malaprobinda, kiel neabono al „Inf.”, se estas eble aboni.

Ellamaa.

M. Grigorjev.



La Idealo de humana Vivo.

El la franca lingvo laŭ Le Père Félix.

La idealo de nia vivo ne estas tiu vulgara idealo, revata de la orserĉantoj kaj malsatuloj de la ĝuado: labori por ĝui, fari sian riĉecon dum dek jaroj per obstiniga laboro, por ripozi dum tridek jaroj en senutila senokupado. Riĉa aŭ malriĉa, tute egale! Mi laboras, ĉar labori estas mia devo de morgaŭ kiel mia devo de hodiaŭ. Mi laboras, tial ke la homo naskiĝis por labori kiel la birdo por flugi, laŭ la bela vorto de la biblio. Se mi kreis por mi, per laborado, la neceson de la vivo kaj remparon kontraŭ la malsato, ne estas por enterigi ĉiujn miajn energiojn en senfruktan ripozon kaj molan riĉegecon, estas por redoni ilin al pli altaj sferoj kaj pli noblaj funkcioj; por mi la laboro sekvas la laboradon, kiel la tago la tagon kaj la devo la devon.

Adoruloj de la ĝuado, laboru por ĝui, laboru nur por via satigo se ne estas por senhonorigi kaj malestimigi vin: mi laboros por aldoni, se mi kapablas, al la progreso de la homaro, la progresojn de mia propra vivo.

Esperantigis

Fino. L. Keverijn.

Hemixem

Esperanto en la Aŭstraj Fervojoj.

Per ordono de la 7^a de novembro 1925. la ĝenerala Direkcio de la federalaj fervojoj de Aŭstrujo anoncas, ke kursoj pri esperanto estos organizataj por la per-

sonaro. La ordono deklaras i. a.: „La sciopovo de esperanto plialtigante la eblecon interlaci inter la vojaĝantoj kaj la agentoj fervojaj, ni rekomendas al ĉiuj niaj salajrituloj eklerni tiun lingvon. Ni permesas uzi la fervojajn oficejojn por okazigi tiujn kursojn en kiuj partoprenos eksklusive la fervojistoj. La dekreto de la 5^a de julio 1923^a de la Ministro de Komercio kaj Komuniko, per kiu estas malpermesata la portadon de speciala insigno dum la deĵoro, ne rilatas al la oficiala esperantista insigno. Estas do permesate porti tiun insignon dum la deĵoro.”

La organo de la Unuiĝo de la germanaj fervojistoj observas pri tiu decido: „Estas eble ke la centra administracio de la Kompanio de la landaj fervojoj decidus elsendi similan ordonon, ĉar estas sendube je la intereso de la servo, favori Esperanto'n.”

* * *


La moderna Turo de Babelo.

En longa artikolo aperinta en la „Daily Herald” de la 9-12-1925, Norman Angell, la famekonata angla publikigisto, pritraktas la egajn malfacilaĵojn, sekvo de la lingvodiferenco.

Jen lia konkludo: „Ŝajnas al mi ke estas nur unu vojo por eliri el tiu labirinto: la vojo de l' Esperanto. Tiu help-lingvo faris mirigajn progresojn, kaj daŭras progresi ĉiutage. Ĉu nun ne estas veninta la momento, ke la kvin aŭ ses ministroj de Publika Instruado de la kvin aŭ ses nacioj la plej vivantaj kaj la plej entreprenemantaj interkonsentu por enskribigi en la programoj de la lernejoj esperanton kiel deviga instrufako.

(Bulletin d'information de l' I. T. F.)

Tradukis A. P..



Informoj.

La kurso per radio de Fino A. Rybo en Kopenhago estas suksego. 1674 lernolibretoj estas venditaj. Gratulojn de A. P. P. K.

Esperantujo.

Inter la kuracistoj kaj medicin-studentoj en Japanujo Esperanto vigle floras. La diversurbaj grupoj kuniĝis en „Japana Ligo de Esperantaj Medicinistoj.” Estas eldonitaj du revuoj: „La Medicino” kaj „Farmacio kaj Hemio.” — Krom multaj artikoloj aperis la verkoj: Medicina Krestomatio de Esperanto, Farmakologia Praktiko, Anatomia Terminaro, Medicina Terminaro.

La konferenco del'Universala Telegrafa Unuiĝo en Paris decidis, ke krom la latina ankaŭ la esperanta lingvo estu permesata.

Same la internac. kongreso de spiritistoj en Paris rekomendis al siaj membroj lerni Esperanton.

La „Kosmopolit,” organo de la Vojaĝo-kaj Sporto-Ligo (Leipzig-Gohlis, Joh. Georgstr. 24) havas Esperanto-Sekcion, por helpi en ĉiuj vojaĝaj aferoj.

La brazilaj komercaj asocioj aprobis la instruon de Esperanto en siaj lernejoj kaj la uzadon de Esp. en korespondo kun eksterlandaj komercaj ĉambroj. — La samon decidis la Amerika Kongreso de Ekonomia Disvastigo.

En General Arenales en Argentino fondigis Centro Esperantista Zamenhof.

En Warszawa (Leszno. 28—13) fondiĝis Esper. Ĵurnalista Servo kun la celo, pere de Esper. raportoj pri eksterlandaj aferoj.

La Leipziga foir-oficejo atentigas pere de bele ilustrita broŝuro pri sia printempa foiro 28. 2.—10. 3. 1926 (Esperanto-Fako, Leipzig, Messamt, Markt 4). Ĝi asertas, ke dum la lasta printempa foiro ĉeestis 14 000 eksponantoj kaj 180 000 vizitantoj (18 000 eksterlandanoj).

Komence de 1925 S^{ro} L. Poncet, Lyon, kuracisto, aplikis Esperanton, por helpe de internac. enketo klarigi la leĝaran staton pri tifoida kaj paratifoidavakcinado. La enketo bone sukcesis; li ricevis informojn el 28 landoj kaj verkis laŭ ili broŝuron, pri kiu ni eble raportos.

De aprilo 1925 Aŭstrujo havas ŝtatan ekzamenon de Esperanto-instruistoj por ŝtataj lernejoj.

La estlanda kulturministerio donacis

al la estona Esperanto-gazeto „Informoj” subvencio de 12 000 mk.

Dum la kongreso de la Orienta Asocio por Tropika Medicino en Tokio (okt. 1925) la profesoroj Ogata kaj Murata paroladis esperantlingve. Multaj partoprenantoj fremdlandaj konsentis, ke internacia lingvo science estas necesa.

La internac. konferenco por uzado de Esp. en la puraj kaj aplikitaj sciencoj (Paris) intencas aperigi teknikan Esp. gazeton internacian.

La internac. kongreso por aernavigado fondis komision por enkonduki Esperanton kiel lingvon teknikan en aernavigado. Komisianoj ankaŭ estas la konataj S^{ro} E. Archdeacon kaj Rollet de L'Isle.

En London (Herts. Welwin Garden City) fondiĝis «The Esperanto Institute Limited» por propagi Esperanton pere de reklam-agentejo, libro-eldonejo, vojaĝ-agentejo, vendado de Esperantaj gramofondiskoj.

Talinn (Estonio) nun havas benefikantan Esperanto-Instituton, en kiu sidas ministeria reprezentanto.

Vizito al la Reĝa Muzeo de Belaj Artoj.

S^{ro} A. Cornette, konservisto de la Reĝa Muzeo de Belaj Artoj, akceptis rondgvidi la esperantistojn tra la muzeo. Li daŭrigos tie kie li ĉesis la lastan fojon. La vizito okazos dimanĉon la 18^{an} de aprilo je la 10 1/2. Oni kunvenos je la deka en la vestiblo de la muzeo.

Neniu samideano povas preterlasi ĉeesti tiun tre interesan promenadon tra nia artkolekto sub la gvidado de la fama kompetentulo, S^{ro} A. Cornette.

Grava Informo.

Pro plialtiĝo de preskostoj la abonprezo de la „Bulteno” estos komence de la 1a de januaro 1926, 6 frb. por la eksterlando.

Iĝu membro de
U. E. A.

La Balo de la „REKTA VOJO”.


La 13an de marto — mezfastan vesperon — la Rekta Vojo organizis sian duan balon. Kokete la salono Van Wesenbeke estis ornamita per multegaj standardetoj de ĉiuj nacioj, per aro da blankaj flagetoj kun verdaj steloj, per florgirlandoj.

Jam frue la dancemuloj sin prezentis. Malfacila estis la tasko de la juĝantaro elekti la plej belajn maskitajn. Fine tutgracia „florkorbo” kaj eleganta „stelisto de Bagdad” forportis la unuajn premiojn.

Je meznokto subite mallumiĝis: nur du verdaj steloj brilis super la portreto de nia kara Majstro, dum aŭdiĝis malbrue „La Espero”.

Solena momento!

Sed baldaŭ relumiĝis; resonis la ekzaltigaj dancarioj kaj la gajaj paroj returniĝadis..... ĝis la tria matene.



PAROLADO.

La **Rekta Vojo**. Sabaton, la 3^{an} de aprilo, je la 8^a vespere, en la sidejo „Hotel Cecil”, Van Arteveldestraat, okazos paroladon kun lumbildoj pri **Finlando**, de S^{ro} prof. J. Jacobs, prezidanto de **A.P.P.K.** Ĉiuj gesamideanoj kaj amikoj estas invitataj ĉeesti tiun interesplenan paroladon.

Argenta Jubileo.

La 2^{an} de Marto. — Gesinjoroj J. Dewaegenaere-Van Gossun festis sian argentan edziĝjubileon. Al la simpatiaj gesamideanoj **A. P. P. K.** ripetas la esprimon de siaj plej sinceraj gratuloj kaj la esperon ke ankoraŭ dum multaj jaroj ili laŭiru kune la vojon de la vivo en plej bona sano kaj feliĉo.

Edziĝo.

Ni havas la plezuron anonci la edziĝon de nia samideano, S^{ro} E. Urbach, kun F^{ino} Weinberg, esperantistino el Saarbrücken. Niaj plej sinceraj bondeziroj akompanu ilin en la nova vivo.

NOVA LERNOLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustritan: **COURS PRACTIQUE D'ESPERANTO** eldonita de Librairie centrale Esperantiste, Paris, kun antaŭparolado de S^{ro} Th. Cart. (192 paĝoj. Prezo: 5.00 Bfr. krom sendkostoj.

Kie renkontiĝas la Antwerpen'aj Esperantistoj?

A.P.P.K. Jaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8^a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A.P.P.K.

Antverpena Polica Grupo Esperantistaj. En la policlernejo, Gildekamerstr. 9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hotel Cecil, Van Arteveldestr. 8.

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 81/2 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A.P.P.K.

RICEVITAĴ.

Revuoj.

Arbeiter Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Göteborg, Svedujo. — Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — Il Cantastorie-Catania, Italujo. — El Heraldio Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Holanda Esperanto Pioniro. Eemnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Informoj de Esperanto-Asocio, Tallinn, Estonio. — La Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Libera Laboristo, Paris, Francujo. — Liberpensulo, Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid. Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo, Kaŭnas, Litovujo. — Amerika Esperantisto, Boston, Usono. — La Semisto, Sabadell, Hispanujo. — Suda Kruco, Melbourne, Aŭstralio. — La Unuigita Tuthomaro, Hamburg, Germanujo. — Vegetarano, Hamburg, Germanujo. — La Ora Epoko, Baden, Svisujo.

Libroj, katalogoj, flugfolioj, k. t. p.

Ĉiuj menciitaj revuoj, libroj, katalogoj, k. t. p. estas je la dispono de niaj membroj.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA
E
PORSPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

2^A JARO

N^O 4

APRILIO 1926

Jara Abono

Belgujo 2,50Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.

Unu Numero

” 0,25Bfr.

” 0,60 Bfr.

KIEN ?

„Ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj aŭ gustetoj, kaj, porke ni akiru por nia aferon la konfidon de la mondo, ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa unueco !”

(Zamenhof-Cirkulera letero 1908)

Se mi ĝis hodiaŭa tago neniam pritraktis publike la lokan malinterkonsenton, estis dank'al mia antipatio preparoli publike familiajn aferojn, principo ankau aprobita de la Centra Oficejo, kiu ĝis nun ĉiam konsilis: „Klopodu solvi amike la malinterkonsenton”.

Flankenlasante la demandon, ĉu tio vere estas la plej bona solvo, ĉio restas kaŝata, la ekstera aspekto restas bone, eĉ tro bone, konservata, dum la bacilo de la malharmonio farinte sian detruan laboron, atakis jam la fundamenton de nia komuna idealo: la reciprokan fidon kaj estimon.

Kaj tamen mi silentados, ĉiam laŭ la ordoparolo de la C. O., malgraŭ ke en la lasta loka kunveno de U. E. A. kelkaj anoj estis disŝirantoj pecon de la vualo, kaŝanta ĉion, malkovrante tiamaniere anguleton de la malinterkonsento.

Sed duonlaboro nenion valoras! Tiuj, kiuj diris A, nun devas kuraĝi diri B. Nun estas la devo de tiuj, kiuj vere volas servi la movadon postuli ke ne nur la anguleto — malkovrita unuflanke — restu malkovrita, sed ke la tuta vualo estu fortirita de tiu afero ne inda al nia movado.

Kien ni irus... se tiu situacio daŭradus?

Ne estas tolerebla ke — pro malsameco de opinio — oni malamikiĝas. Nia movado, kiu per sia interna ideo celas la interpopolan pacon, ne toleras tion. Kaj mi ne toleros ke — pro persona malamikeco — nia movado estos malhelpata en sia kreskado pro dividado de fortoj. Koncentrigo estas necesa! Ni ne forgesu, ke ni estas ankoraŭ malfortaj, ke nenia propagandiga forto povas perdiĝi.

Al la junaj kaj novaj samideanoj mi volas atentigi, al la malnovaj, kiuj ŝajnas forgesi ilin, remomerigi la vortojn, kiujn nia kara Majstro emocie diris en Krakovo kiam li forlasis sian oficialan rolon: „Mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: Laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo..... Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne simpla lingvo..... sed ke ĝi estas grava socia problemo”.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke Antwerpen, invitis la XX^{an} Un^{an} Kongreson. Mi skrikas Antwerpen celante la Antwerpen'an anaron. Tamen laŭ mia modesta opinio la nuna atmosfero — kaj nenio antaŭvidigas pliboniĝon — ne taŭgas por ricevi Universalan Kongreson, kaj estos eĉ tre danĝere — por la movado mem — prezenti al ĝi dividitan lokan anaron.

Ne ankoraŭ estas malfrue..... sed la tempo urĝas!

Kiu volas helpi min forblovi tiun nigran nebulon, kiu kovras nian lokan movadon, kiu malpermesas al la eksterstarantoj konsideri ĝin laŭ vere, kaj taksu laŭ valore la progreson de la tutloka movado.

Mi atendas..... espereble ne vane.

A. Posener.

Komitata Kunveno de la Belga Ligo Esperantista

Bruselo, la 26^{an} de marto 1926.

Ĉeestis 18 delegitoj. — S^{ro} Cogen prezidis.

S^{ro} Witterijck, estante malsana, petas eksciĝon kiel prezidanto de B. L. E. kaj petas ke oni anstataŭu lin.

Oni ne akceptas lian peton; li devas resti en la kaploko de B. L. E.; la laboron faros por li la vic-prezidantoj.

S^{ro} Elworthy - Posenaer ankaŭ ne povas ĉeesti pro malsano de sia edzo, kiu tute blindiĝis.

1. Akcepto de novaj grupoj.

a) „Esperantista Grupo” el la Panne. — Akceptita.

b) „La Rekta Vojo” el Antwerpen. — Tiu ĉi grupo retiras sian aliĝpeton, ĉar ĝia kotizo por la jaro 1926 ne permesas pagi abonon al „Belga Esperantisto” por ĉiuj anoj, kiel tion postulas lastsendita informo de B. L. E.

S^{ro} Schoofs protestas kontraŭ la neebleco de deviga abono al B. E. por ĉiuj anoj de la grupoj aliĝintaj al B. L. E.

S^{ro} Pirnay (Verviers) opinias ke multaj foriros se abono estas deviga kaj ke la grupo el Verviers devos eksciĝi se oni nepre postulos devigan abonon.

Aliaj deligitoj samopinias.

S^{ro} Van de Velde (Gent) preferas nacian gazeton ol grupan, kaj internacian ol nacian.

S^{ro} Schoofs — Se estas tiel, ni forigu Belgan Esperantiston. En la ekzistado nur de internaciaj gazetoj estas grava danĝero; U. E. A. faris jam grandajn pekojn kontraŭ la lingvo.

S^{ro} Jacobs (Antwerpen). — La plimulto de la naciaj organoj malfacile ekzistadas. Jus aperis trafa artikolo pri abono al

nacia revuo de S^{ro} Grigorjev en „Informoj de Esperanto Asocio de Estonio.”

S^{ro} Schoofs — Se aliaj ne faras sian devon, kial „Verda Stelo” daŭrigus fari sian tutan devon? Estas malrekompensi la bonajn laborantojn. (Rim. Cetere nur tiuj kiuj abonas B. E. kaj eble ne legas ĝin, estas la veraj laborantoj por la movado en Belgujo).

La konkludo de la diskutado estis ke, se oni volas ŝanĝi tiun artikolon de la regularo de B. L. E., oni faru proponon en venonta kunveno.

S^{ro} Pirnay diras ke la centro de la esperanta movado estas en Antwerpen. Dum kelka tempo oni havis provincajn delegitojn por gvidi la propagandon; poste oni proponis lokajn delegitojn. Sekve de tio li ĉesis sian agadon kiel provinca delegito kaj en la provinco Liège estas plu nenio.

S^{ro} Petiau komunikas ke la delegitoj de la ĵus akceptita grupo de La Panne baldaŭ alvenos. La prezidanto de la venonta nacia kongreso ne ankoraŭ bone povas paroli en esperanto, sed li estas tre fervora samideano kaj influa persono; lia sekretario pli bone scipovas esperanton kaj estas vigla laboranto.

S^{ro} Jaumotte — Kvankam la grupo „La Rekta Vojo” reprenas sian aliĝpeton, mi protestas je la nomo de „La Verda Stelo” jam nun, kaj eventuale poste, kontraŭ la akcepto de tiu grupo, ĉar inter la nomoj de la anoj estas tiu de S^{ro} J. De Waegenaere. Tiu sinjoro iris ĉe la skabeno de la publika instruado por ke oni forprenu de nia grupo; — kiu estas la reprezentanto de B. L. en Antwerpen — la lernejon, kie ni okazigas niajn kursojn. (Rim. — De post kiam? Kion diras pri tio „Antverpena Grupo Esperantista” kaj „Suda Lumo”?) Tia agado estas ne nur kontraŭ la loka movado, sed kontraŭ la tuta esperantista movado. Se idisto farus tion, jam estus malbela ago, sed se esperantisto faras tion, tio estas nepardonebla. Belga Ligo ne povas toleri tian agmanieron.

S^{ro} Jacobs. — Sinjoro De Waegenaere kaj multaj aliaj samideanoj el Antwerpen opinias ke la agado de „Verda Stelo” multe malhelpas la enkondukon de Esperanto en la lernejo kaj estas do kompreneble ke oni provas per ĉiuj rimedoj forigi tiun malbonan influon. La opinioj tiurilate staras do rekte unu kontraŭ la alia, kiel tio ankaŭ okazas en politiko; tio ne signifas ke oni devas nepre kondamni la kontraŭulon kiu agas laŭ sia honesta konvinko.

S^{ro} Petiau. — Ĉar fakte la akcepto de la grupo „La Rekta Vojo” ne plu estis en la tagordo, mi ne notos la diskutadon tiurilate en la raporto.

S^{ro} **Schoofs** — Mi restarigis en Antwerpen la Policistan Grupon kaj aranĝis kurson por tiu ĉi grupo. S^{ro} **Jacobs** skribis leteron al la urbestro en kiu li diris ke la kurso devas esti farita de instruisto kaj ke ĝi devas daŭri almenaŭ 100 horojn.

S^{ro} **Jacobs** — Kiu el ni lernis Esperanton en 12 lecionoj? A. P. P. K. konvinkigis ke 200 horoj ne estas tro multaj. (Brua ridado de S^{ro} Schoofs, Jaumotte, De Ketelaere.)

S^{ro} **Schoofs** — Tiam vi ankaŭ diras ke Zamenhof mensogis (Rim. — Mi ne scias ke la Majstro ie diris aŭ skribis ke 12 lecionoj sufiĉas al ĉiuj por plene lerni esperanton. Tiu tempo apenaŭ sufiĉas por teorie klarigi la gramatikon kaj la vortfaradon.)

S^{ro} **Jaumotte** — Oni povas fari planan kurson en 10 - 15 lecionoj.

S^{ro} **Petiau** — Ni ne plu diskutu pri tiu afero; ni jam sufiĉe pridiskutis ĝin la pasintan jaron.

S^{ro} **Pirnay** — Ni konstatas ke en Antwerpen estas granda malinterkonsento inter la esperantistoj. Tio povas endanĝerigi la XX^{an} universalan kongreson de Esperanto, kiun oni volas organizi en tiu urbo.

S^{ro} **Schoofs** — „De bom zal wel eens barsten.” (La bombo certe jam eksplodos). (Rim. — Atentu, geanoj de la grupoj aliĝintaj al A. P. P. K. ! Oni estas preparanta kontraŭ vi bombon grandegan (terure !) kiu nenigos vin ĉiuj je la sama momento ! (brrr !) For la batalilojn ! Vivu la pacaj ? batalantoj !)

2. Financa situacio de „Belga Ligo” kaj de „Belga Esperantisto.”

S^{ro} **Mathieux** konstatas ke la enspezoj iam superas la elspezojn. La mona situacio estas sufiĉe bona.

El la ciferoj donitaj de S^{ro} **Mathieux** oni lernas ke por la proksimume 200 abonantoj al Belga Esperantisto oni presigis de ĉiu numero 900 ekzemplerojn kiuj kostas 5600 frankojn. (Rim. — Kiu povas klarigi al mi jenan aferon ? La pasintan jaron Verda Stelo pagis ekzakte 300 kotizojn al B. L. kaj sekve disponis pri 12 voĉoj en la komitata kunveno. La nunan jaron tiu grupo pagis ekzakte 100 kotizojn. (91 kun abono al Belga Esperantisto.) Ĉu en unujaro tiu grupo perdis 200 anojn ? Aŭ ĉu estas pli facile pagi el la kaso 300 foje 1 frankon ol 300 foje 8,50 fr. ?) S^{ro} **Petiau** instigas la varbadon de anoncoj por B. E.

S^{ro} **Pirnay** diras ke la komercistoj ne kredas en la efikeco de anonco en B. E.. Samideano Henrion metis anoncon, kiu nenion al li raportis. Dum multaj mendoj alvenis el ĉiuj partoj de la lando, neniu oni faris sekve de la anonco en B. E.. Sinjoro Henrion do prave opiniis ke tia anonco ne valoras la monon kaj ne plu metis anoncon. Ankaŭ B. E. malregule aperis.

S^{ro} **Schoofs** — Belga Esperantisto apparait regulièremment maintenant. (Li ridante rigardas S^{ro} **Jaumotte**.) (Rim. — Ĉu do la ĉefredaktoro de B. E. mem ne kredas en la regula aperado de la revuo ?)

S^{ro} **Petiau**, mallate al S^{ro} **Schoofs**: „Il y a Malines qui n'assiste pas.”

S^{ro} **Schoofs** — mallate „Tant mieux.” (Rim. — Tio certe ne estas komplimento por la Mehlena Grupo.)

3. Kongreso de La Panne. — Provizora programo.

En la franca lingvo S^{ro} prezidonto de la venonta nacia kongreso klarigas kion oni jam faris kaj petas de B. L. pliajn informojn. Provizore la programo estas:

Sabaton, la 22^{an} de majo, vespere, renkontiĝo de la jam alvenintaj kongresanoj.

Dimanĉon, la 23^{an} matene, oficiala akcepto en la komunuma domo, malfermo de la kongreso, fotografado; posttagmeze: festeno; vespere: festo kaj balo.

Lundon, la 24^{an}, ekskurso al Oost-Duinkerke.

4. Nia estonta agado: a) ĉe la oficialuloj.

S^{ro} **Petiau** pensas ke la plej bona rimedo por atingi la oficialulojn estas la tempo de la elektadoj.

Oni decidis sendi informojn pri la esperanta movado al la oficialuloj.

b) ĉe la radiofonaj stacioj Brussel kaj Antwerpen.

S^{ro} **Jaumotte** ricevis la permeson de la direktoro de la Zoologia Ĝardeno de Antwerpen, kie estas radiofona stacio, fari kurson pri esperanto. La kurso komencos post 2 - 3 semajnoj. (Rim. — Restas nekomprenbla afero, kial profesia instruisto ne povas gvidi tian kurson. Estas tamen sufiĉe da bonaj instruistoj en Verda Stelo; ĉu ili ne meritas aŭ kapablas fari tian kurson ?)

c) ĉe la radiofonaj revuoj. Malgraŭ prava espero fraŭlino Jennen ne ankoraŭ sukcesis enpresigi esperantan rubrikon en „Radio Home”.

5. Fondo de „Belga Esperanto - Instituto”, koopera societo.

S^{ro} **Jaumotte** komunikas ke en „Verda Stelo” oni fondis kooperan societeton, „Belga Esperanto Instituto”, kies celo estas precipe la librokomerco.

S^{ro} **Schoofs** — Tio ne estas flandra afero, sed estas belga instituto, kiu donos parton de la profito al B. L. (Rim. — La nomo „instituto” estas malĝusta kaj erariga. Laŭ ĝenerala kompreno instituto estas scienca aŭ lingva organizaĵo, kiel estas la Flandra Esperanto - Instituto, pri kiu aludis S^{ro} Schoofs. El la Esperanto - Institutoj menciitaj en la jarlibro de U. E. A. (1925), ĉeĥoslovaka, finlanda, germana, japana, neniu estas komerca entrepreno. Ili precipe celas la sisteman propagandon kaj instruadon de la lingvo. En Finnlando

ambaŭ organizaĵoj ekzistas tre klare apartigitaj: O. Y. Movado A. B. (Esperanto - Oficejo Finnlanda, kies celo estas la vendado de libroj, k. t. p. kaj la Esperanto - Instituto de Finnlando, neŭtrala institucio por la instruo de Esperanto. Nun ni almenaŭ klare komprenas kio estas Belga Esperanto Instituto, menciita sur la kovrilo de Fundamento de Esperanto, eldono flandra-holanda, eldonita en 1922. Multan sukceson mi deziras al la entrepreno kaj volonte aĉetos en la nova librovendejo, se nur la prezoj ne estas pli altaj ol ie alie.)

6. Alcentrigo de la propagando: a) pli intenca grupa kunlaboro; b) eldono de propagandiloj: *esperanto film, glumarkoj kaj afiŝoj.* (Mechlena Grupo).

S^{ro} Cogen — Ĉar neniu de Mehleno ĉeestas ni transiros al la sekvonta punkto. (Rim. — Vidu supre la mallaitan interparoladon inter S^{roj} Petiau kaj Schoofs. Tiu punkto estis vere la plej interesa el la tuta tagordo kaj povis certe esti preparolita sen la ĉeesto de delegito el Mehleno.)

7. Komunikado de la Esperantista Sekcio de la Universala Kongreso de Stenografio en Bruselo 1927.

S^{ro} Cogen faras diversajn komunikojn pri tiu kongreso kaj invitas ĉiujn esperantistojn - stenografistojn interrilatikun li.

8. Reelekto de la ligestraro.

Lai propono de S^{ro} Jaumotte oni aplaŭde reelektas la saman ligestraron.

9. Diversaj komunikaĵoj kaj proponoj. S^{ro} Schoofs informas la ĉeestantojn ke oni jam komencis labori en Antwerpen por la XX^a universala kongreso de esperanto. S^{ro} Desonay (Spa) komunikas ke la 14^{an}-17^{an} de aŭgusto de la nuna jaro okazos internacia Kongreso de Esperantistoj Katolikaj. Je tiu okazo oni organizos grandan religian koncerton. Okpaĝa gvidlibro pri Spa estos eldonita.

J. Jacobs.

Esperanto kaj la Finna Registaro.

La ministro de la Publika Instruado de Finnlando donis subvenciojn de 6000 markoj por la organizo de speciala Esperanta kurso por la geinstruistoj, dum la Kristnaska libertempo kaj por la eldono de broŝuro esperantlingva, redaktata de S^{ro} Setälä, lingva profesoro en la Universitato de Helsinki kaj nuntempe ministro pri fremdlandaj aferoj en Finnlando.

Edziĝo.

Ni havas la plezuron sciigi la edziĝon de S^{ro} Robert De Becker, ano de Lier'a Stelo kun F^{ino} Anna Leflot, filino de la prezidanto de Lier'a Stelo.

A. P. P. K. sendas al la novaj geedzoj siajn plej korajn gratulojn kaj siajn plej sincerajn bondezirojn por longdaŭra feliĉa kunestado.

Tuttaga Ekskurso al Koningshoyckt, Berlaer kaj Kessel.

Dimanĉon, la 9^a de Majo 1926.

(organizita de A. P. P. K.)

PROGRAMO

Kunveno en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekerstraat, 10, je la 9^a matene.

Kuna veturado al Oude - God (Komunuma Domo) per tramveturilo (aŭ per specialaj aŭtobusoj).

Forveturo el Oude - God al Koningshoyckt per specialaj aŭtobusoj, je la 10^a.

En Koningshoyckt vizito de la fama kokinbredejo „Elevage du Château". La posedantoj, S^{ro} Baeyens kaj S^{ro} Gevers-Baeyens mem gvidos nin.

Klarigoj en Esperanto.

Post la vizito, tagmango en Koningshoyckt.

Je la 2^a p. m. promenado al Berlaer.

En Berlaer ripozo kaj kafotrinkado.

Je la 5^a foriro el Berlaer.

Promenado al Kessel; tre agrabla vojo inter arbaroj.

Je la 8^a forveturo el Kessel al Oude - God per specialaj aŭtobusoj.

Alveno en Oude - God je la 9.

La personoj kiuj deziras reiri pli frue al Antwerpen povas reveturi el Berlaer je la 13.44 aŭ je la 17.29.

Estas ankaŭ okazo por veturi per vagonaro el Antwerpen al Berlaer je la 9.14. De tie piede iri ĝis Koningshoyckt. En tiu ĉi vilaĝo oni atendas la alvenon de la aŭtobusoj.

La personoj kiuj veturos per biciklo devas esti en Koningshoyckt je la 10.1/2 kaj tie atendas la alvenon de la aŭtobusoj.

Oni ne forgesu zorgi pri siaj mangaĵoj.

Ĉiuj gesamideanoj kaj familianoj povas kuniri.

Por proksimume scii la nombron de la partoprenantoj kaj speciale por aranĝi la veturadon per la aŭtobusoj, oni informu kiel eble plej baldaŭ.

J. Jacobs

Boomsche Steenweg, 444

Antwerpen.

Nia Ideo. La 5^{an} de Majo komencos Esperanto kurso. Ĉiuj lernemuloj estos bonvenintaj.

Samtempe komencos korespondad' vespero. Ĉiuj eksterlandaj samideanoj kiuj deziras kunhelpi al la sukceso de tiuj korespondad' vesperoj estas petataj sendi ĉiajn korespondadojn (p. k. let.) al la sidejo, Volksgebouw, Meir 64, Antwerpen.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENAJ
PROPAGANDA



PORESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

Ben. K. P.

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSS TRAAT 51

2^A JARO

N^o 5

MAJO 1926

Jara Abono

Belgujo : 2,50Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.

Unu Numero

" 0,25Bfr.

" 0,60 Bfr.

Ni esperu !

La aprila n^o de B. E. konigas al ni ĝojigan novaĵon. S^{ro} Schoofs, nia ĉefdelegito gratulante la Bruselajn pionirojn, kiuj prenis sur sin la restarigon de la tiea movado, elparolis jenajn saĝajn vortojn :

„ Por konservi entuziasmon inter la *geesperantistoj*, li konsilas la *intergrupajn vizitojn* kiuj naskis pli intiman kunlaboradon. ”

Ni ege ĝojas, ke nia principo de intergrupaj kunlaborado fine enpenetris lian cerbon kaj esprimas nian tutkoran deziron, ke ankaŭ ĉi tie li memoru sian saĝan konsilon porke liaj estontaj agoj estu gvidataj de ĝi.

A. P. P. K.

Historio.

Antaŭ mi kuŝas la februara n^o de Belga Esperantisto.

Mi ege bedaŭras ricevi ĝin nur nun kaj esti devigita kontraŭdiri ion, kion oni komunikas, ne laŭ vere en la Belga

Kroniko. Sed estas pli bone fari tion iam, ol neniam.

Jen la teksto: „ La prezidanto (de la Verda Stelo) klarigas denove la sintenadon de nia grupo rilate al la organizo de la oficialaj kursoj de Esperanto, pri kiuj ni ĉiuj ĝojas. Ili estas rezultato de nia longjara, senhalta kaj pacienca penado por nia lingvo. Tiu unua triumfo tamen ne ebrigu nin : restas ankoraŭ multaj aliaj fakoj, kiujn ni devas almiliti. ”

Mi ege miris legante tion kaj porke oni ne estu devigata post kelkaj jaroj revizii kaj korekti la erarojn — kiel oni jam devas fari por kelkaj naciaj — en la historio de la loka movado, mi volonte volas klarigi denove, sed laŭ vere, tiun aferon.

Estis dum la stariga kunveno de A. G. E. D (Diamantista grupo) ke ties membroj esprimis per rezolucio la deziron, ke ĉiu loka grupo deligu du anojn por iri kune ĉe la skabeno de publika instruado por pledi tie la enkondukon de Esp^o en la oficiala instruado. Ĉar la grupoj restis surdaj, kaj ne volonte perdi tempon senutile, la prezidanto de A. G. E. D. kaj

S^{ro} Danckaerts tagaestrarano de la A. D. B. (Diamantista sindikato) iris ĉe la tiama skabeno kaj nuna ministro de publika instruado S^{ro} K. Huysmans por peti lian kunlaboron. Tiu - ĉi, partiano de la ideo pri mondlingvo kaj kiu pro la videbla progreso de Esp^o ege favoris nian lingvon, promesis sian kunhelpon kaj la rezulto baldaŭ vidigis per la starigo de la **unua** oficiala Esperanto Kurso en la vesperinstruado gvidata de S^{ro} Michiels.

La lokaj grupoj anstataŭ ol estimi tiun gravan fakton kaj apogi la laboron de juna grupo, daŭrigis la propagandon por privataj kursoj kaj kiel eklipso la oficiala kurso baldaŭ malaperis.

La afero ŝajnis ripozi, eble por eterne, kiam antaŭ du jaroj ĉe kelkaj fervoraj samideanoj naskiĝis la ideo, kunvoki la lokajn grupojn por pli fervore ol antaŭe labori por la oficialigo de Esp^o kaj klopodi retrovi tion, kio estis perdita.

El tiu intergrupna eklaborado ekestis la nuna A. P. P. K.. Sen fanparonado ĝi komencis serioze la laboron kaj sekvante la saman vojon kiel A. G. E. D. ĝi trovis la skabenon ĉiam helpema kaj sukcesis restarigi du elementajn kursojn la pasintan jaron, al kiuj sekvis nunjare du perfektigaj kursoj.

La permeso alglui esperantan afiŝon ĉe la lernejoj muroj — permeso neniam tolerita por propagando kia ajn —, la kvar kursoj gvidataj de oficiale pagataj instruistoj, estas faktoj videblaj de bone komprenita intergrupna kunlaborado.

Sed nenia grupo, aliĝinta al A. P. P. K., rajtas diri ke al ĝi oni tion ŝuldas, do certe ne grupo ne aliĝinta kiu male, en la komenco de nia propaganda laboro kontraŭis nian ne facilan taskon.

Iomete pli da modesteco kaj certe pli da honesteco publikigante tian gravan fakton estu dezirinde!

A. Posener.

Interna Politiko.

Popolo havas ĉiam internan politikon; konsekvence tiuj el ni, kiuj konsideras la Esperantistaron, kiel veran popolon, pli-malpli konscie enkondukis en ĝin la politikon. En tiaj cirkonstancoj la agado al ekstero, la varbado de novaj aliĝantoj fariĝas nur flanka afero, dum la ĉefaj,

senĉese diskutataj demandoj koncernas nur detalojn de la interna vivado kaj ofte verajn bagatelojn, kies graveco rezultas nur de la akreco de la disputoj. Samopiniantoj kuniĝas kaj formas iun partion, kaj volenevole tiuj, kiuj ne akceptas iliajn ideojn, fariĝas kontraŭuloj kaj estas apartigitaj en dua partio. Naskiĝis interna politika batalado. Neeviteble, en ĉiu partio, viroj pli agemaj, pli spertaj aŭ pli influricaj estas konsiderataj, kiel ĉefoj; kaj tiel la malfeliĉaj *personaj demandoj* baldaŭ sin enmiksas en la diskutojn. Iu kontraŭbatalas opinion, kiun cetere li scias bona, nur tial, ke ĝi estis esprimita de S^o A., kiu apartenas al kontraŭa partio; reciproke, li subtenas ideon, kiun li eĉ konfesas absurda, pro la sola fakto, ke ĝia protagonisto estas S^o B., lia amiko. Se unu partio entreprenas propagandon en iu kampo, tuj la alia partio rapidas fari la samon, kaj tiu konkurenco ne nur ne helpas, sed kaŭzas kelkfoje tian dividon de la fortoj, ke nenio sukcesas.

Kio, en ĉio tio, fariĝas la « sankta afero », la frata « interna ideo »? La propagando, la disvastigo de Esperanto estas ja preskaŭ forgesita. Sukceson oni deziras kaj celas nur tiam, kiam ĝi povas esti atingita de la « bona partio ». Se nova triumfo estas ŝuldita al la agemo de S^o C., kaj se S^o C. ne estas ano de la sole bona koterio, tiam ĝi estas senvalora, tiam oni eĉ pli-malpli rekte, pli-malpli kaŝe, ĝin malhelpas.

Jen al kio kondukas la mizera politiko interne de *popolo*.

Eble oni opinios, ke nia bildo estas iom nigre pentrita, ke mi iom trogravigis la konsekvencojn de internaj malpacoj. Eble! kaj cetere mi volonte konfesas, ke tiaj ekstremaj sekvoj estas ja maloftaj. Tamen bone estas, ke ni ilin pripensu, ke ni taksu ilian malutilon, por ke per ĉiuj niaj fortoj ni ilin evitu.

Carlo Bourlet.

(*La Revuo - Aprilo 1913*).

Iĝu membro de
U. E. A.

XVa Belga Kongreso de ESPERANTO

LA PANNE, 22-23-24 de Majo 1926.

Adreso : Sekretario S^{ro} J. Van Doren,
Nieuwpoortlaan, 33. Poŝtĉekonto
N° 1701.24.

PROGRAMO de la XVa Belga Esperanto - Kongreso.

Sabaton, 22an de Majo. — En « Hôtel
des Arcades ».

10a h. Akcepto de la kongresanoj ;

20a h. Interkonatiĝa kunveno ;

21a h. Kunveno de la Ligestraro kun
la loka organiza komitato.

Dimanĉon, 23an de Majo.

10a h. Kunveno de la kongresanoj en
« Hôtel de la Poste » ;

10a h. 30. Oficiala akcepto en « Hôtel
de la Poste » ;

11a h. Ĝenerala Kunveno de « Belga
Ligo Esperantista » en « Hôtel de la Poste »

13a h. Fotografado de la kongresanoj
sur la marbordo ;

13a h. 30. Festeno en « Hôtel des
Arcades » ;

20a h. Balo kun intertempaj amuzajoj,
en la belega dancosalono « Vieux Bruxelles ».

Lundon, 24an de Majo.

9a h. Ekskurso (piede aŭ tramveture)
al Oostduinkerke ;

13a h. Komuna tagmanĝo en « Grand
Hôtel » ĉe Samideano Benoît ;

15a h. Promenado sur la marbordo
kaj disigo.

Esperanto, lingvo de Radio

Ĉiuj niaj legantoj certe konscias pri la graveco de la nuna propagando de Esperanto ĉe radiistoj. Necese estas, ke ni esperantigu multajn radiistojn kaj, por tio, ke ni igu por ili Esperanton utila. Ankaŭ, ni devas radiistigi kiel eble plej multajn Esperantistoj, montrante al ili, kiel facile kaj interese estas konstrui mem radio-ricevilon, por ke multaj el niaj samideanoj aŭskultu la sendojn de la radio-stacioj kaj povu instigi ilin al uzado de Esperanto aŭ gratuli ilin pro ĝia uzado.

Tial ni kun ĝojo salutas la aperon de la unua numero de „Internacia Radio Revuo“, monata organo de „Internacia Radio-

Asocio“. Dank' al ĝi Esperanto utilos ne nur al nunaj Esperantistoj, kiuj trovos en ĝi ĉiajn konsilojn necesajn, por konstrui mem malfare radio-aparatojn, sed ankaŭ al radiistoj ankoraŭ ne esperantistoj, kiuj legos en ĝi internaciajn informojn alie ne haveblajn, se nur ili konsentos dediĉi tre malgrandan penon al ioma lernado de Esperanto.

„Internacia Radio Revuo“ ja celas kontentigi jenajn kategoriojn de legantoj :

1^o Esperantistojn, kiuj interigas pri Radio, pri uzado de Esperanto en Radio, kiuj volas propagandi Esperanton inter radiistoj aŭ deziras fariĝi radio-amatoroj ;

2^o Komencantajn radio-amatorojn, bezonantajn sisteman gvidadon en ilia laboro, emajn ekkoni la teorion, la „misterojn“ de Radio, solvi multajn dubindajn problemojn, kiujn ili renkontas dum sia laboro ;

3^o Spertajn radio-amatorojn, kiuj volas trovi la kronikon de la tutmonda radio-movado, analizojn de la plej interesaj artikoloj el la tutmonda radio-literaturo, lastajn novaĵojn kaj inventojn.

La unua numero entenas interalie originalan artikolon pri propagigo de la elektro-magnetaj ondoj, verkitan de nia fama malnova samideano, profesoro Mesny : konsilojn pri diversaj metodoj por instalado de antenoj ; detalan priskribon de malmultekosta facile konstruebla ricevaparato ; unuan artikolon el teoriaj babiladoj „Paŝo post paŝo“ ; humoran felietonon „Zoologia studo pri radio-amatoro“ ; artikolojn de la ĉefredaktoro D^{ro} P. Corret, pri la propagando de Esperanto ĉe radiistoj kaj pri la Esperanta teknika radio-vortaro ; detalan kronikon de la radiista kaj radi-esperantista movado, k.t.p. Bela kovrilo kaj multnombraj ilustraĵoj certe ne malplaĉos al la legantoj.

La unua numero estos *senpage* sendata al ĉiu esperantisto, kiu mendos ĝin de la eldonisto, sendante samtempe, por la sendelspezoj, unu internacian respondukuponon (por Francujo unu 30-centiman poŝtmarkon). Nepre mendu ĝin, ĉar dank' al ĝi vi povos tre malmultekoste konstrui vian propran aparaton.

La abonprezo por unu jaro estas uur duon-dolaro. Via esperantista devo estas aboni, por subteni la tiel gravan propagandon de Esperanto ĉe radiistoj, samtempe havigante al vi tre interesan kaj

fruktodonan legajon.

La abonmendojn sendu laŭ adreso : „ Internacia Radio Revuo ”, E. Chiron, eldonisto, 40, rue de la Seine, Paris - 6^e.

Ekskurso al Vlissingen per vaporboato.

La 18an de Julio „ La Rekta Vojo ” organizos ekskurson al Vlissingen. Povas partopreni ĉiuj esperantistoj kun siaj familianoj kaj geamikoj. La partoprena prezo estas 15 frankoj.

La provizora plano estas jena : Foriro el Antwerpen je la 7a matene. Alveno en Vlissingen proksimume je la 12a. Promenado al la centro de la urbo. Tie oni povas refresigi ĝis la 2a ; poste daŭrigo de la promenado laŭlonge la marbulvardon al la banejo. Tie ni restos 2 horojn por amuzadi, bani, k. t. p. Kvarono antaŭ la 5a per tramo al la forirejo. Je la 5a foriro al Antwerpen, kie ni alvenos inter la 9a kaj la 10a vespere.

Se sufiĉe da gesamideanoj partoprenos, ni havos dumvoje orkesteton, kaj senpagan rezervotan tramon de la banejo al la forirejo.

Oni sin enskribigu, antaŭ la 25a de Junio, pere de sia grupo, aŭ senpere ĉe

S^{ro} A. Lodema.

Lange Dijkstraat, 62.

Oni parolas pri Esperanto

« Le Matin » (5. 4. 26.). — Raporto pri la parolado pri Finnlando, farita de S^{ro} Jacobs, en « La Rekta Vojo ».

« De Diamantbewerker » (1. 5. 26.) — Pri la lastaj progresoj de Esperanto ĉe F. P. T. T.

Edziĝo.

Ni havas la plezuron sciigi ke F^{ino} Agnes Delanoeye, anino de « La Rekta Vojo », edziniĝis kun S^{ro} Gustave De Deckere.

A. P. P. K. esprimas siajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn al la junaj geedzoj.

Kie renkontiĝas la Antverpen'aj Esperantistoj ?

A.P.P.K. Ĵaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A.P.P.K.

Antverpena Polica Grupo Esperantistaj. En la policlernejo, Gildekamerstr.9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hotel Cecil, Van Arteveldestr. 8.

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 8 1/2 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A.P.P.K.

RICEVITAĴ.

Revuoj.

Amerika Esperantisto. Boston, Usono. — Arbeiter Esperantisten. (La laborista Esperantisto). Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto) Göteborg; Svedujo. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — El Heraldó Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Esperanto. Genève, Svisujo. — Holanda Esperanto Pioniro. Emmes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Il Cantastorie-Catania. Italujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Le Sincériste, Waltwilder par Bilsen, Belgujo. — La Ora Epoko. Baden, Svisujo. — La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — La Verda Ombro. Taihoku, Japanujo. — Libero. Sofio, Bulgarujo. — Liberpensulo. Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid. Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelto. Kaunas, Litovujo. — Nov - Esperanto. Bern, Svisujo. — Samosa Esperantisto. Samos, Grekujo. — Oomoto. Paris, Francujo. — Suda Kruco. Melbourne, Aŭstralio. — Unione (Medial). Nürnberg Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

Libroj.

Fundamenta Krestomatio de la internacia lingvo Nov-Esperanto da Antido. Bern, Svisujo.

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

2^a JARO

N^o 6

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

JUNIO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo 2,50Bfr.
" 0,25Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

Kiel la Majskarabo

Estis en la mezo de la pasinta monato. Post la vintrosimilaj tagoj la Naturo ekkompatis kun ni kaj sendis malavare la sunbrilon, kiun ni tiel avidis. Kun la Naturo ankaŭ la homoj eksanĝas. La malvarmo kiu malhelpas ĉion ekkreski, ŝajnis ankaŭ fermi la homojn, kaj nur unu sunradio jam sufiĉas por malfermi ties karakterojn kaj fariĝi ilin pli sentemaj al bonfaraj agoj.

Mi sidas antaŭ la fenestro kaj rigardas en la straton. Post varma lacigea labor-tago mi ĝuas de „dolce far' niente”.

Je la alia stratflanko sidadas areto de bubetoj gestantaj, kriantaj, kaj mi penas scii kion ili estas farantaj. Subite, kvazaŭ ili volas helpi min esplori la kialon de tiu bruado, horo da infanvoĉetoj eksonas al miaj oreloj. Kaj, ĉu estis la influo de l' sunradioj, mi sentis min tiel senzorgema, tiel juna, kvazaŭ havanta ankoraŭ knabetanimon, kaj senvole mi ankoraŭ mallaŭte kantis kune

Muelisto,
Monnombristo,
Foren flugu! (1)

Nun mi sciis... kaj dolĉaj longeforflug-

(1) Flandra popolkanteto per kiu la infanoj incitas la majskarabon al forflugo.

itaj memoraĵoj preterŝvebis miajn okulojn. Sed, se la daŭra ripetado de l' infankanteto preskaŭ endormulis min, la laŭtegaj ĝojekkrioj kruele deŝiris min el mia meditado. Ĉiuj bubetoj ekstaras ĉirkaŭante unu el ili, kiu tenas fadenon, je kies fino flugetas majskarabo, kiu — kvazaŭ sentanta sin libera — uzis ĉiujn siajn fortojn por forflugi al ia celo... al... jes kiu povus priskribi pri kio cerbumas tia malgranda insekt-kapeto.

Sed se infano kelkfoje estas bona, vere infananima, kelkfoje infano similas al plenkreskulo, estanta tiel malkompata kiel tiu-ĉi.

Ektireto kaj la majskarabo falus teren... kiam tuja energia movo de infanmano, rompanta la fadenon, liberigis la insekton kiu ĝuante nun planan liberon forflugas al tiu por ĝi definitiva fincelo.

For la lulilo! Ne tiel komprenis liaj kamaradoj. Bruega interdisputado sekvis kaj neniam mi forgesos la parolojn kiujn diris la posedanto de l' infanmaneto: « Vi havas krurojn, vi kuras do. Ve! tiu, kiu malhelpus vin kuri. Sed se vi havus flugilojn, vi flugus pli alten, pli malproksimen ol ni. Kion vi dirus se oni tiam al vi forprenus la flugilojn. Lasu do nin kuri, sed lasu ankaŭ flugi tiujn estaĵojn, kiujn la Naturo pro tio elektis ».

Silentego sekvis la disputadon. Ĉu la knabo trafis la koron de siaj kamaradetoj?

Mi ne scias... Sed iom poste mi revidis ilin, ludantaj kune, pruvante per tio, ke malgraŭ ilia malinterkonsento ili ne malpacigis.

Efektive, la stratbubeto pravis. Infankruretoj malrapide marŝas. Tiuj de plenkreskuloj plirapide movas. Sed plej rapide flugiloj vin portas al la celo definitiva, tiel malproksima ĝi estu! Kaj kia movado ne staris iam sur infankruroj, plenkreskis kaj deziris havi flugilojn por atingi kiel plej baldaŭ la fincelon.

Sed kiam oni incitas nin al daŭra laboro por progresigi la oficialigon de nia kara lingvo — kiel oni incitis la majskarabon al forflugo — kial do, kiam ni volas forflugi, ne kiam ni nur intencas etendi niajn flugilojn, oni daŭre malhelpas tion kaj penas tiri nin malsupren!

Ĉu vere ne estus sufiĉe da energiaj geknaboj inter ni por rompi la fadenon?

A. Posener.

Internacia Esperanto-Servo.

Grava paŝo de la bulgara poŝto favore al Esperanto.

Sekvante la decidon de la lasta kongreso de la Universala Telegrafa Unio, en Paris, kiu adoptis Esperanton kiel „lingvoklara”, ekvalidiĝanta la 1^a novembro 1926, la ministerio de P.T.T. de Bulgarujo per speciala dekreto de 19 marto (Nro. 83076) deklaris Esperanton jam de nun kiel lingvon klaran por la poŝta teritorio de Bulgarujo.

Per oficiala ordono (Nro. 83800) de 5 aprilo 1926 la Direkcio de P.T.T. informis siajn administrajn organojn pri tiu ĉi dekreto kaj speciale rekomendis al sia personaro la studon de Esperanto.

Por ebligi al la poŝtistoj simplan scion pri Esperanto ĝi samtempe ordonis la afiŝadon de klariga tabelo de la tuta gramatiko de Esperanto en bulgara lingvo kun multnombraj ekzemploj praktikaj en 500 poŝtoŝtancoj.

I.E.S.

Ekskurso al Koningshoyckt, Berlaer kaj Kessel.

(Dimanĉon, la 9an de majo 1926.)

Alveninte per aŭtobuso kaj biciklo, 45 gesamideanoj el Antwerpen, Lier kaj Mechelen kolektiĝis antaŭ la enirejo de la preskaŭ unukilometro longa aleo kiu kondukas al la belega parko de S^{ino} Baeyens. Post rapida kaj amika interkonatiĝo kaj salutado la grupo, kiun ornamis diversaj esperantaj flagetoj, en plej gaja humoro ekmarŝis. La vetero, kiu estis iom pluvema antaŭ la forveturo, tiom plibeligiĝis ke oni povis antaŭvidi plej agrablan tagon. La beleco de la printempa foliaro, la fresko de la matenaj odoroj, la trankvileco

de la naturo ravis ĉiujn kaj malrapide, respektplene, kvazaŭ timante la majestatan naturon, oni promenadis ĝis la kastelo.

S^{ino} Baeyens, la posedantino de la bieno, ŝia bofilo S^{ro} R. Gevers-Baeyens, la direktoro de la fama bredejo de kortbirdoj « Elevage du Château », starigita en parto de la bieno kaj fraŭlino Gevers venis el la kastelo renkonte al ni. La prezidanto de A.P.P.K. prezentis la gesamideanojn al la gegastigantoj, klarigante samtempe kio estas Esperanto. Juna fraŭlino transdonis al S^{ino} Baeyens grandegan bukendon da tulipoj je la nomo de la gesamideanoj. S^{ro} R. Gevers kore dankis kaj deziris bonvenon al la gevizitantoj kaj multe ĝojis pri ilia vizito. Post tiu interkonatiĝo komencis la vizito al la bredejo sub la gvidado de la geposedantoj. S^{ro} Jacobs, kiu montris ke li ankaŭ estas spertulo pri bredado, laŭte kaj pli detale klarigis en Esperanto la informojn, kiujn donis al li S^{ro} R. Gevers.

Ni eniras la unuan ĉambron, la kovĉambron. En ĝi troviĝas grandegan kovmaŝinon kiu enhavas 4.200 ovojn, dividitaj en 20 tirkestoĵoj de po 210 ovoj. Kvankam formante unu maŝinon hejtigitan per unu forno, la tirkestoĵoj funkcias sendepende unu de la alia. Oni do ne bezonas pleniĝi la tutan maŝinon je la sama momento; oni pleniĝas unu aŭ pliajn tirkestoĵojn laŭbezone je diversaj tagoj. Tiu aranĝo faras ke ĉiutage naskiĝas kokidetoj. Dum en kelkaj kompartimentoj tute trankvile kuŝas la ovoj, en aliaj la naskiĝantoj estas trapikantaj sian mallarĝan malliberejon, en ankoraŭ aliaj la viglaj novnaskitoj premis sin antaŭ la fenestron de sia naskiĝdomo por rigardi la eksteran mondon. En la apuda ĉambro, de kiu parto estas aranĝita, kiel oficejo, troviĝas manĝaĵujoj kaj diversaj aparatoj por dispreni kaj mueli grenojn, furaĝkukojn kaj ostojn, kaj por miksi la manĝaĵojn. La gvidanto tie ĉi ankaŭ montras la specialajn skatolojn por forsendi kovovojn kaj unutagajn kokidetojn. En la oficejoj la prezidantoj de la grupoj reprezentitaj estas petataj subskribi la oran libron. S^{ro} Jacobs montras kaj klarigas la uzmanieron kaj utilecon de specialaj numeritaj ringoj en aluminio kiujn oni metas ĉirkaŭ la kruro de la bestoj por tiamaniere fiksi ilian identecon.


Poste ni trairas la bredĉambron. Ĝi estas grandegan vitran ĉambron, dividitan en diversaj fakoj. Laŭ la aĝo la kokidoj pasas intersekve de unu fako al alia. En ĉiu fako estas speciala varmigaparato kun varmo reguligita laŭ la aĝo de la kokidoj. Tre vivoplenaj la birdetoj kuras, bekbatas kaj disgratas lapajlon, kiu kovras la teron. Ĉiuj sajnas esti kiel eble plej sanaj. Al ĉiu fako korespondas apartan liberaeran kurejon sur herbejo.

Post kiam la kokoj distingiĝas de la kokinoj oni metas ilin en apartaj ejoj.

Por la reproduktado S^{ro} Gevers disponas pri 800 kokinoj, dividitaj en grandaj kaj en



Bredejo de la Kastelo en Konings-Hoyckt. — La granda Kokidejo.



Serio da trapnestoj.

malgrandaj specialaj pargetoj. La kokejoj kun la necesaj kurejoj okupas areon da 4 hektaroj. Oni nur bredas tri rasojn da kokinoj, t. e. : la grizaj Mechelen'aj kun simpla kresto, la blankaj Leghorn'aj kaj la ruĝaj Rhode-Island'aj, kaj du rasojn da anasoj: la malhelaj de Rouen kaj la Khaki-Cambell'aj.

Post la vizito al la grandega kokidejo ni iras tra la longaj aleoj de la kokinejoj, ĉiuj konstruitaj laŭ la plej lastaj sciencaj

eksperimentoj. Oni ne sufiĉe povas admiri la belajn ekzemplerojn de la nomitaj rasoj. Ne nur laŭ la eksteraj la montritaj bestoj estas modeloj, sed ankoraŭ pli pro internaj kvalitoj, pro la ovdemeteno, ili estas famaj. Tio estas sekve da la severa kontrolado kaj elektado de la reproduktantoj. En internacia kaj dujara konkurso de ovdemetado, organizita en Bentley (Anglujo) de « Daily Mail ». Mechelen'a kokino de s^{ro} R. Gevers demetis 238 ovojn

en unu jaro, kio estas mondrekordo por nia granda nacia raso.

La kontrolado de la kokinoj okazas per trapnestoj. En la antaŭa parto de tiaj nestoj estas movebla breto, kiun malsuprenfaligas la eniranta kokino. Tiamaniere ŝi enfermas sin mem kaj ne plu povas eliri el ĝi; alia kokino ankaŭ ne plu povas eniri en okupita nesto. Kontrolanto preterpasas de tempo al tempo, malfermas la antaŭan parton de la nesto kaj palpas ĉu la kokino jam demetis ovon. Se jes, li liberigas la kokinon el la nesto, notas ŝian numeron sur la ovon kaj samtempe metas strieton malantaŭ ŝia numero kaj sub la numero de la tago. Tiamaniere oni povas scii kiom da ovoĵ kokino demetis en fiksita tempo. Tiujn, kiuj ne sufiĉe bone demetas, oni forigas, nur el la bonegaj demetantinoj oni bredas. Sed ĉar la bonaj ecoj ne nur dependas de la kokino, sed ankaŭ grandparte de la koko, oni al tiuj-ĉi dediĉas multe da zorgoj. Tial ni povas vidi longa vico da ejoj kun po unu rezerva koko.

Por fini ni admiras lapezajn anserojn de Rouen kaj la famajn anserojn Khaki-Campbell. En kolombejo montriĝas diversaj belegaj specimenoj de diversaj rasoj de kolomboj: smerloj de Antwerpen, pigo-kolomboj kun longa kolo, k. a..

S^{ro} Jacobs dankas la afablajn gegastigantojn jela nomo de la vizitantoj, dezirante al ilia entrepreno daŭran prosperadon.

Ĉar estis jam tagmezo, estis tempo por kontentigi la malplenan stomakon. Tial ni tuj iris al kafejo, kie oni manĝis kun bona apetito la kunportitajn manĝaĵojn, dum rondiras vidaĵkartoj adresitaj al en-kaj eksterlandaj samideanoj.

Post kiam ĉiuj estis bone ripozintaj oni promenadis al Berlaer. Dumvoje oni haltis por la fotografado. La Esperantaj flagetoj, la kantoj en la lingvo internacia mirigis la preterpasantaj vilaganojn.

En Berlaer atendis nin agrabla surprizo. Tie estis la kirmeso. Ĉe la domoj flirtis la nacia flago, en ĉiuj kafejoj aŭdigis gajaj tonoj de dancmuziko, sur la vilaga placo amaso da vilaganoj ĉiu aĝaj svarmis ĉirkaŭ la karusejoj, la balanciloj kaj la diversaj budoj. Post mallonga ripozo la gesamideanojne plu povis rezisti la allogon de la amuzajoj. Post duonhora dancado en belege ornamita dancejo ni forlasis la gajan vilaĝon por daŭrigi nian promenadon al Kessel. S^{ro} D^{ro} Andries kaj s^{ro} Baesens adiaŭis kaj reveturis al Mechelen.

La vetero estis nun tre agrabla. La vojo kondukis nin preter grandegaj, pentrindaj ĝardenoj. S^{ro} Leflot donis tre interesajn informojn pri la historio de la preterpasitaj bienoj. Duonvoje, meze de arbaro oni haltis. Baldaŭ la tuta grupo agrable ripozis sur la dolĉa herbo kaj ĝuis kiel eble plej multe de la naturaj belajoj.

Sed la tempo ne haltas. Baldaŭ ni devis daŭrigi la promenadon. Je la sesa oni alvenis en Kessel. La aŭtobuso kiu veturigis la pli grandan parton de la ekskursanoj al Oude-God baldaŭ alvenis.

Generala adiaŭado! La Antwerpen'aj biciklistoj akompanis la nelacigeblan prezidanton de Lier'a Stelo al lia urbo.

Tiamaniere finigis la ekskurson kiu kunigis la utilon kun la agrablon kaj kiu montraskiamaniere. A.P.P.K. komprenas intergrupan kunagadon.

K. OKO.

Ekskurso al Mechelen kaj

Ĉirkaŭaĵoj

La 27an de Junio.

PROGRAMO.

Kunveno ĉe la Centra Stacidomo je la 8 1/2 matene.

Forveturo el Antverpeno je la 9.9 h., alveno en Mechelen 9.31 h.. Vizito de la preĝejoj Nia Sinjorino, S^{ta} Rombout kaj S^{ta} Johano aŭ urbdomo. Je tagmezo forveturo vaporŝipe al Hever; je la 13a tagmanĝo en tiu loko kun kunportitaj manĝaĵoj (ovaĵoj k.t.p. estas haveblaj). Je la 14a vizito de la lago de Hofstade. Je la 15a reformveturo al Mechelen. (Kostoj de la vaporŝipa vojaĝo: 2fr.; fervoje fr. 1.60; aŭtobuse 2fr.) Daŭrigo de la vizito al la urbo.

Foriro al Antverpeno je la 9a vespere.

Kie renkontiĝas la Antwerpen'aj Esperantistoj?

A.P.P.K. Ĵaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A.P.P.K.

Antverpena Polica Grupo Esperantistaj. En la policlernejo, Gildekamerstr.9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hotel Cecil, Van Arteveldestr. 8.

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 8 1/2 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A.P.P.K.

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA  POR ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: ⁸²⁰⁻⁸²⁴
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SMIEDER 55 STRAAT 51

2^a JARO

N^o 7

JULIO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

2^a JARFESTO

Okaze de la 2^a DATREVENO de la fondiĝo de nia Komitato kaj de la disdono de memoraĵo al la diplomitoj de la urba perfektiga kurso de Esperanto ni havas la honoron inviti

LA GESAMIDEANARON

je la SOLENA FESTVESPERO, kiu okazos Sabaton, 24^{an} de julio 1926, je la 8 1/2 vespere en la granda salono de

"CENTRAAL SCHOUWBURG"

10. Van Wesenbkestraat, E. U.

LA KOMITATO.

Sukceso de nia Laboro.

La unuaj plenaj dujaraj kursoj de Esperanto, organizita de la Antverpen'a urbestro laŭ la sama bazo de la kursoj de angla kaj germana lingvoj finigis la 31an de aprilo. Je la fino de majo kaj komenco de junio okazis la finaj ekzamenoj kiuj estis por la gekursanoj la kronado de ilia senhalta, obstina laborado. Ĉiuj senescepte sukcesis kaj akiris la diplomon. La fakto estas despli notinda, ĉar estas la unua fojo en la historio de la Esperanta movado en Belgujo ke atesto pri plena studado de la lingvo estas aljuĝita de publika administracio.

A.P.P.K. povas plenrajte diri: "Rigardu, jen estas nia laboro." Prave ni povas fieri pri la enviinda rezultado, kion oni ŝuldas nur al nia nelacigebla laborado kaj kiun ni atingis malgraŭ la daŭra malhelpado de "fervoraj" (?) samideanoj.

La kursoj okazis dum 27 semajnoj ĉiujare, libertempoj neenkalkulitaj. Ĉiusemajne estis 2 lecionoj duhoraj. Plena kurso do havis 108 lecionojn kaj daŭris 216 horojn proksimume. La profesoroj estis profesiaj instruistoj.

La unua eksperimento finigis. Ni nun povas fari komparon inter la famaj (?) 12-15 leciona sistemo ankoraŭ rekomendata de multaj gvidantoj de la movado en nia lando kaj la minimuma 200 hora de la oficiala, inter la instruado donita de neprofesiulo kaj de profesiulo.

Ni nun invitas la reprezentanton de Belga Ligo Esperantisto en K. R., ĉefdelegiton de U. E. A., kaj liajn amikojn, kiuj kontraŭ la vero per belegaj paroloj kredigas al nesciantoj ke ili subtenas la oficialajn kursojn kaj ĝojas pri iliaj rezultatoj, fari seriozan esploron pri la afero. Ke ili parolu kun la personoj kiuj sekvis la oficialajn kursojn! Ke ili demandu ilian opinion pri la ricevita instruado! Ke ili demandu la geprofesorojn ĉu ili sciis kion fari dum la 200 horoj! Ke ili komparu la rezultojn de sia preferata sistemo kun la oficiala, la nia, laŭ vera, pura esperantista vidpunkto (ne laŭ mona subteno al "Belga Esperantisto") kaj ni estas certaj ke ili tuj bruligos tion kion ili adoris kaj adoros tion kion ili bruligis.

A.P.P.K.

La oficialaj Kursoj.

Dum la monato junio okazis la fina ekzameno de la urbaj superaj kursoj de Esperanto. La juĝantaro, komisiita de la kolegio de la urbestro kaj skabenoj, konsistis el:

s^{ro} A. Verschueren, urba ĉefinspektoro de la instruado, prezidanto;

s^{roj} A. Roose kaj H. Michiels, kantonaj inspektoroj de la instruado, (anoj)

f^{ino} B. Geers, profesorino, (anino)

s^{ro} J. Karnas, profesoro, (ano).

20 personoj sin prezentis kaj ili ĉiuj sukcesis.

Akiris la diplomon de plena studado de Esperanto kaj kapableco pri komerca korespondado:

s^{roj} W. Bruynooghe, J. Cats, s^{ino} J. De Waegenare, s^{roj} A. Lodema, A. Posener, N. Rabau, F. Roelants, J. Roelant, J. Rombouts, L. Rombouts, L. Valengé, J. Van Cleemput, f^{ino} M. Van der Mast, s^{ro} J. Van Kerckhove, f^{ino} I. Van Ganse, s^{roj} E. Van Steertegem, J. Van Tiggel, M. VanTiggel, f^{ino} I. Verhoeven, s^{ro} A. Vets.

Al ĉiuj A.P.P.K. prezentas siajn plej sincerajn gratulojn.

Stranga Songô.

Iam mi estis ege laca pro la taga laborado, kaj kiam mi enlitigis, mi tuj ekdormis kaj songis.

Sed kian songon mi havis! Amikoj, estis terure!

Por ke vi mem sentu tiujn teruraĵojn, mi ilin rakontas al vi:

Mi estis morta.

Mi tamen bone vidis mian edzinon, mian filon, miajn gepatrojn, gefratojn kaj aliaj familianojn, kiuj staris ĉirkaŭ mia lito kaj ploregis, ploregadis! Miaj oreloj doloris pro la bruo kiun ili faris.

Poste venis du homoj, kiuj metis min en malgrandan, tro malgrandan ĉerkon. (estis pro tio ke mi perdis la kapharojn kaj iĝis senharulo).

Oni forportis min al la tombejo, enterigis min kaj lasis min trankvila.

Sed, ĉar mi ĉiam estis bonulo, kaj neniam faris ion malbonan, mi certe eniros en la ĉielon; tion mi pripensis, kiam mi kuŝis tiel sole kaj malgaje en la mallumo; kaj jen venis anĝelo, kiu metis min en

flugantan ĉaron kaj flugis kun mi ĉielen. Tie, ĉe la pordo, mi vidis maljunulon, estis Sankta Petro, la pordisto, kiu demandis al mi mian nomon. "Mi estas Johano el Hobokeno", mi diris kaj tuj la pordo malfermiĝis.

Mi eniris. Ho! Kiel belege estis tie! Oraj muroj, arĝentaj pavimoj, ĉio estis delikata.

Por lumigi la salonegojn, oni ne uzis lampojn aŭ gazon, ankaŭ ne elektron. En la plafono estis metitaj diamantoj, kiuj brilis, brilis tiel forte ke vivanta homo ne povis rigardi ilin; sed ĉar mi estis morta, mi do povis tion.

Jen, rizkaĉo estis alportata en ora laktujo, kaj ni feliĉaj ĉielenloĝantoj, formangis ĝin rapide per arĝentaj kuleroj. Por ke oni ne forŝtelu tiujn multekostajn kulerojn, oni havas specialajn policistojn en la ĉielmangejoj.

Kiam mi estis multe manginta, mi foriris promeni tra la ĉielĝardeno. Mi vidis Sanktulojn, kiuj estis plantantaj terpomojn aliajn aranĝis, sub la gvidado de la Sankta Patro, la legumojn kaj florojn, aŭ metis starkon en la putojn. Poste mi venis en la kuirejon, kie la Sankta Patrino kuiris supon en grandega kaldrono, dum Sanktulinoj purigis terpomojn. Sed unu el la Sanktulinoj sidis malgaje en anguleto; ŝi ploris, jes ŝi ploris en la ĉiela domo. La larmoj eliris el ŝiaj okuloj kaj eĉ el ŝia nazo! Tion mi ne komprenis. Mi do iris al ŝi kaj demandis: "Kara Sanktulino, kial vi do ploras?" — "Mi purigis bulbojn," ŝi respondis.

Nun mi komprenis bonege ĉar mi ankaŭ ne volonte purigas bulbojn.

Mi daŭrigis mian promenadon kaj venis al kinematografejo. Mi ne eniris ĉar la enirprezoj estis tro alte fiksitaj.

Sed subite mi ekaŭdis la tonojn de gaja kanto! Mi kuris al la loko, kie mi aŭdis tion kaj vidis trinkejon, kien mi rapide eniris, trinkis glason da biero kaj aŭskultis. Sed dum mi sidis ĉe la tablo, rigardante la kantanton, mi pensis ke mi jam antaŭe vidis tiun mienon, kaj jen! mi rekonis lin! Li estis kantisto de la bird-vendejo!

Li bone kantis kaj la biero estis bona. Mi trinkis glason post glaso, mi ebruiĝis kaj ankaŭ mi kantis gajan kanton.

Sed sonorilo eksonis. Mi pensis ke

estis por tagmanĝi; sed ho ve! estis la vekhorloĝo, kiu vekis min por rekomenci la ĉiutagan laboradon.

J. Van Tiggel.

Urbaj esp. Ekzamenoj.

Kun granda plezuro ni ricevis vian leteron de 25 junio kaj kore dankas vin pro la raporto pri la instruado en la komunuma publika servo de via urbo, kiu treege interesis nin.

Aparte interesa por ni estis la sendita diplomo, kiun ni enigis en nian kolekton.

Ni gratulas vin kaj ĉiujn samideanojn, kiuj kunhelpas en tiu pionira laboro kaj ni esperas, ke ĝi multe helpos al la progreso de nia movado en Belgujo.

Interesus nin, ankoraŭ sciigi, en kiom da lernejoj okazis tiuj ekzamenoj kaj kiu-grade vi kunlaboris kun Belga Ligo Esp., kiu certe volos utiligi la rezultatojn por laŭcela propagando en via lando.

Kun kora danko kaj multaj bondeziroj plej samideane

Internacia Centra Komitato
de la Esperanto-Movado

Rob. Kreuz
Ĝenerala sekretario

Ekskurso al Hemixem.

Merkredon, la 21an de julio, A.P.P.K. iros al HEMIXEM por tie preni sian novan flagon ĉe ^{groj} Keveriĵn. Forveturo per aŭtobuso de la Urba Naĝejo (Zwemdok) je la 2a akurate.

Ĉiuj kuniru!

La Reĝta Vojo. Sabaton, la 19an de junio, s^o Jef De Waegenaere tre interese parolis dum pli ol unu horo pri la ŝajne simpla demando: Kie Rubens naskiĝis? Post mallonga kaj trafa skizo pri la vivo de Rubens kiel artisto, li tuj komencis solvi la demandojn:

a). Rubens ne naskiĝis en Germanujo, kiel multaj pretendas. Por tion provi la parolinto priskribis parton el la vivo de la gepatroj Rubens, rilatiginte tion al la Hispanaj Teruroj en nia lando. Tiamaniere li klare elmontris ke la patrino de nia majstro ne estis en Germanujo por naski lin.

b). Rubens naskiĝis en Antverpeno. Per diversaj oficialaj kaj kvazaŭ-oficialaj dokumentoj la tuta auskultantaro baldaŭ estis konvinkita, kaj per vigla aplaŭdado dankis nian ĉiam junan pioniron Jef.

Boata Ekskurso al Vlissingen.

La ekskursontoj troviĝos je la 7 3/4 horo matene la 18an de Julio sur la "flosanta ponto,, Suikerrui. Ne forgesu viajn identeckartojn. Estas konsilinde kunpreni pluvmantelon; seĝine utilus por la pluvon, tiam ĝi povos servi kontraŭ la vespera malvarmeto. Plie oni bezonas nur bonan humoron kaj gajecon.

A. Lodema

Parolado.

London, la 19an de julio 1926a. je la 8 1/2 vespere, S^{ro} Karnas parolos, en la granda salono de la HOTEL CECIL, Van Arteveldestraat, pri la Kancero kaj ĝia kontraŭbatalo.

La parolado estos agrabligita per lumbildoj kaj filmoj.

Infanoj, malpli ol 16 jaraj, estos rifu-zotaj.

Nia Ideo. Okaze de la ekskurso al Hemixem, la grupo foriras je la 9a matene, kunveno je la kvarono antaŭ la naŭa je Dorpsplaats, Hoboken. Ĉiuj estas bonvenaj.

Edziĝo.

La 24an de junio s^{ro} Karel Leflot, membro de "Lier'a Stelo", filo de la prezidanto de tiu-ĉi grupo, edziĝis kun f^{ino} Bertha Hoyberghs. Al la juna paro A.P.P.K. sendas siajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.

* * *

S^{ro} Raphaël Nogueira, Estado de Minas. Santa Luzia do Carangola, Brazilujo. Profesoro de kontoscienco ĝenerale kaj inĝeniera studento, deziras korespondadon kun ĉiulandaj gesammineanoj per p. k. i. kaj interŝanĝi p. m.. Ĉiam kaj tuj nepre respondos.

* * *

S^{ro} K. Foznjak, Ĉita la strato, 41 Zijskajo U.S.S.R. Ruslando interŝanĝas p. k. (bfl) l. kaj p. m.

Kie renkontiĝas la Antverpen'aj Esperantistoj ?

A.P.P.K. Ĵaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8^a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A.P.P.K.

Antverpena Polica Grupo Esperantista. En la policlernejo, Gildekamerstr.9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hôtel Cecil, Van Arteveldestr. 8.

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 8 1/2 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A.P.P.K.

RICEVITAJ.

Revuoj.

Amerika Esperantisto. Boston, Usono — Arbeiter Esperantisten. (La laborista Esperantisto). Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto) Göteborg, Svedujo — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — El Heraldó Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Esperanto. Genève, Svisujo. — Holanda Esperanto Pioniro. Emnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Il Cantastorie-Catania. Italujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Le Sincérisme, Waltwilder par Bilsen, Belgujo. — La Ora Epoko. Baden, Svisujo. — La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — La Verda Ombro. Taihoku, Japanujo. — Libero. Sofio, Bulgarujo. — Liberpensulo. Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid. Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo. Kaunas, Litovujo. — Nov - Esperanto. Bern, Svisujo. — Samosa Esperantisto. Samos, Grekujo. — Oomoto. Paris, Francujo. — Suda Kruco. Melbourne, Aŭstralio. — Unione (Medial). Nürnberg Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENĀ PROPAGANDA
E
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHĖ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTR. 51

2^a JARO

N^o 8-9

AUGUSTO-SEPTEMBRO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo : 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

Al la Laboro.

La libertempo finiĝis. La infanoj de nove eniris la lernejon, la instruistoj reprenissian pedagogian rolon kaj la propagandistoj de movado kia ajn ree komencos pli aktive ol antaŭe.

Se la novaj oficialaj kursoj vokas nin al la laboro, la ĵus finita Int. Kongreso pli forte vokas nin al la propagando por pli peza laboro.

Kia estas do tiu laboro farota?

En la labora kunsido de la I. K. prof. Bovet parolis tre detale pri la eksperimentoj kiujn nun preparas la fama instituto J. J. Rousseau en Genève.

Unu el tiuj havas mian plenan fidon kaj mi deziras al ĝi plenan sukceson, ĉar ĝi estas la unua paŝo sur la vojo, kiun ni ĉiuj devus suriri, — nome la unujara anstataŭado de iu fremda lingvo per Esp. en lernejoj publikaj kaj privataj — el kio povus sekvi poste la ĝenerala oficialigo. Mi ĝojis legi tion bedaŭrante tamen ke la ordoparolo ne estis donita pli firme. Por

tia laboro devus regi ĉie plenan unuecon, kaj sen timi ian kontraŭdiron mi riskas diri, ke preskaŭ nenie tio estas. Kontraŭe preskaŭ ĉie regas malkonkordo tiurilate. Se ne estas pro personaj ambicioj — kio ne estas tiel grava, ĉar iam tamen ni devos meti la movadon super la personaj — tiam estas la «paca» batalo inter la principanoj de oficialaj kaj privataj kursoj.

En tiu malinterkonsento kuŝas nun la plej granda malhelpaĵo por la realigo de l' plano Bovet.

Tie ĉi ni ebenigis jam iomete la vojon. Nia kara lingvo estas konata en la oficiala instruado — la diplomo kaj raportoj en la antaŭa kaj nuna n.oj eble konvinkos nun la nekredemulojn — kaj el tiu fakto povus eble sekvi plej baldaŭan efektivigon de tiu plano.

Sed por tiu realigo ni bezonas ĉiujn fortojn, unuecon antaŭ ĉio!

Kelkaj semajnoj disigas nin ankoraŭ de la rekomenco de la oficialaj kursoj. Ĉu ni vidos ankoraŭfoje la malĝojigan spektaklon, ke oficialaj instruistoj gvidos **privatajn** kursojn, havantaj la okazon

puŝi la movadon antaŭen, instruante la samajn lernantojn en oficialaj kursoj.

Nur la principo malhelpos ilin partopreni en tiu pionira laboro, kiu estos samtempe antaŭprepara laboro por la plano Bovet. Tiu ĉi jaro neniu varbu do lernantojn por la privataj kursoj kaj sendu kiel eble plej multe da varbitoj al la oficialaj vesperkursoj.

Ju pli da Esp. vesperkursoj des pli facile ni akiros la kunhelpon de la ĉefuloj el la Publika Instruado.

Bona gesto de la kontraŭuloj kaj Antverpeno, kiu neniam estis konservema nek timis iri en novan direkton rilate la pedagogio, eble povus esti la unua urbo kiu akceptus la planon Bovet.

A. Posener

NIA DUA JARFESTO.

Du jaroj ! Tio eble nur valoras du monatojn en la jam longedaŭra Esp. movado ; sed la atingitaj rezultatoj, la rikolto de tio, kio antaŭ du jaroj estas semita, rajtigas

Schouwburg, " bele ornamita per la bonaj zorgoj de S^{ro} Libot, per Esp. kaj diversnaciaj flagetoj. baldaŭ plenigis je Esperantistoj, familianoj kaj geamikoj. La scenojn ornamis la flagoj de «Nia Ideo» kaj «Diamantistoj». Krom diversaj reprezentantoj de la loka gazetaro, ankaŭ ĉeestis S^{mo} Fr. Schoofs, ĉefdelegito de U.E.A.

Je la 8a kaj duona horo la festo komenciĝis per la himno «Espero» ; pie kaj respektplene la ĉeestantoj ekstaris kaj kunkantis la ŝatatan himnon. Poste la kantoj, muzikaĵoj kaj paroladoj regule kaj laŭprograme sinsekvis. Evidentis, ke ĉiu laŭkapableco kunlaboris por sukcesigi la vesperon. La simpatia prezidanto de «Nia Ideo» nin ravis, kantante 4 belajn kantojn. Sed lia grupo ankaŭ ne detenis sin : ili kune kantis «Ventegoj», Polan kanton, kaj «Vivu Zamenhof». Poste ili transformiĝis de kantoro en parolhoron kaj aŭdigis «La Vojo» de Zamenhof, kio kaŭzis trafan impreson ĉe tiuj, kiuj antaŭe ne aŭdis parolhoron. S^{ro} J. Calis, per sia profunda,

STAD ANTWERPEN



URBO ANTWERPEN

Hoogere leergang van Esperanto

Het College van Burgemeester en Schepenen
van Antwerpen, Jos
regeert te Burgenhout den 11^{den} Septembar 1901
Dezen verordenende besloten hebben wij dat alle leden van het Hoogerem Leerang, resp. de Hoogere leergang van Esperanto, in Antwerpen, welke de 11^{den} Junij 1901, de 11^{den} Junij 1901.

Supera kurso de Esperanto

La Kolegio de Urbestro kaj Ŝtatenoj
de Antwerpen, Jos
regeert te Burgenhout den 11^{den} de Septembar 1901.
Dezen verordenende besloten hebben wij dat alle leden van het Hoogerem Leerang, resp. de Hoogere leergang van Esperanto, in Antwerpen, welke de 11^{den} Junij 1901, de 11^{den} Junij 1901.

Namens het College van Burgemeester en Schepenen :
Je la nomo de la Kolegio de Urbestro kaj Ŝtatenoj :

De Secretaris
La Substanciaro
[Signature]

De Burgemeester
La Urbestro
[Signature]

De Schepen van Onderwijs
La Ŝtatenoj de publika instruado
[Signature]

De Jury
La Ekzamenantaro
[Signature]

De Voorzitter
La Prezidanto
[Signature]

De Leden
La Membroj
[Signature]

Unua oficiala diplomo disdonita en Belgujo.

brilan feston. La oficiala disdono de diplomoj al la diplomitoj de la Urbaj Oficialaj Vesperkursoj de Esp. ; la inaŭguro de nia flago ; la fiero pro nia dujara laboro ; jen la tri ĉefaj kaŭzoj, kiuj influadis la kunmetadon de la programo.

La granda salono de la " Centraal

bele sonanta voĉo, kantis du kantojn franclingve «Le Cor» kaj «Pauvres Fous». Vera violonartisto sin montris S^{ro} F. Van Kerckhoven. Akompanata per la fortepiano de S^{ro} G. Jennart, li sentoplene ludis dum granda atenteco de la aŭdantaro, la 9an koncerton de De Bériot :

«Herinnering» (rememoro) kaj «Serenade de Lisette». Nia amikino, F^{ino} Alida Verstraeten, unue deklamis «Een lied van de Zee», (Kanto de l' maro) kaj poste la impresiganta «Pregon sub la Verda Standardo». Sed la impresado de ĉi tiu preĝo plialtigis ĝis entuziasmo, kiam dume F^{ino} Verstraeten deklamis, F^{ino} Lucie Keverijn senfaldigis super ŝia kapo, la novan flagon de A.P.P.K. donacitan de sia simpatia patrino. Jen neforgesebla momento, kiu sveligis la korojn eĉ de la maljunaj batalantoj. Refoje S^{ro} Jacobs, la prezidanto de A.P.P.K., dankis patrinon Keverijn kaj samtempe li kaptis la okazon por honorigi S^{ron} Keverijn, kiu antaŭ kelkaj tagoj ricevis nacian ordonon pro 25 jara fidela kaj honesta servado, transdonante donacon de la membroj de A.P.P.K.

Pri la paroladoj de S^{ro} Neuzil, nia Ĉeĥoslovaka samideano, kaj de S^{ro} Verschueren, Inspektoro de Publika Instruado, pli kompetentaj plumoj ol la mia raportos. La diplomitoj ricevis ilian diplomon kune kun la bondeziroj de la Inspektoro kaj taŭganta donacon de A.P.P.K. La prezidanto, S^{ro} Jacobs estis laŭdata de S^{ro} P. Van Sitteren, dum F^{ino} Lodema transdonis florbukedon. Kortuŝite S^{ro} Jacobs dankis; li memorigis ke sukceso estas akirita de la firma kunlaborado de Sroj de Wagenaere, Swalf kaj la delegitoj de la aligitaj grupoj kaj per vigla movo li metis la bukedon antaŭ la portreton de Zamenhof, tiel montrante ke la floroj kaj la fruktoj de niaj laboroj estas por la efektivigo de la granda Ideo de nia Majstro. La ago de S^{ro} Jacobs kaŭzis varman aplaŭdon.

Ni ne volas pretendi ke ĉi tiu raporto estas plenplena, tamen ion, kion ne multaj rimarkis, ni devas mencii. Forirante el la salonego ni vidis S^{ron} Schoofs, manpreman antan S^{ron} Jacobs. Ĉu tia «amikaĵo» enhavas promeson por la estonto? Ĉu tio signifus la komencon de la fino de la malinterkonsento kaj malsato en Antwerpen? Ĉu venis la tempo de kunlaborado, tiel necesega? Se tio povus naskiĝi el tiu manpremo ni estas certaj, ke post kelkaj jaroj la diplomoj ne plu estos disdonataj en la «Centraal Schouwburg» sed en la Urba Festsalongo!

A. L.

RAPORTO PRI LA PAROLADO DE S-ro A. VERSCHUEREN,

Ĉefinspektoro de la Publika Instruado en Antwerpen, okaze de la disdono de la diplomoj al la lernintoj de la oficialaj vesperkursoj en Antwerpen.

La 24an de Julio 1926a.

Sinjorinoj, Sinjoroj,

Je la nomo de la estraro de Antwerpen, je la nomo de la urbaj ĝeinspektoroj mi venis tien ĉi por disdoni la diplomojn al la lernintoj de la oficialaj vesperkursoj.

Al ĉiuj mi adresas miajn gratulojn, al ĉiuj mi deziras brilan sukceson en la estonteco.

Persone mi fieras, ke ankaŭ mi alportis per mia subteno ŝtoneton al la granda konstruaĵo: ESPERANTO.

Mi vidas tie ĉi nian bonan, maljunan De Wagenaere, mi vidas Jacobs kaj Swalf kiuj senlace venadis en mian malhelan oficejon por paroli al mi pri sia idealo. Estas ankoraŭ aliaj laborantoj.... Oni tiris min je du flankoj. Sed, en ĉi tiu afero mi staras super ĉiuj opinioj kaj firme mi apogis la klopodojn de De Wagenaere, Jacobs kaj Swalf pro la beleco de la afero mem.

Mi gratulas A.P.P.K., kiu per belaj premioj rekompensas tiujn, kiuj kurage dum du vintroj sekvis la vesperkursojn por ellerni la mondlingvon.

Kun ĝojo mi salutas S^{ron} Michiels, kiu bonvole akceptis esti membro de la juĝantaro; mi dankas lin same kiel lian kolegon S^{ron} Roose. Mi mem ĉeestis al la ekzameno. Mi insistis por ke la sinjoroj juĝu severe, sed juste. Kaj tion ili faris.

Sukceson mi ankaŭ deziras al la ĝeinstruistoj, kiuj gvidis la kursojn, kaj mi esperas ke dum longaj jaroj ili daŭrigos sian laboron. Inter la diplomitoj mi rekonas ĝeinstruistojn kaj laboristojn. Dank' al Esperanto ĉiuspecaj homoj estas kunigataj. Se la instruistoj estas la apostoloj, la lernantoj estas la levidoj. Vi, lernintoj, iĝu ĉiuj fervoraj pioniroj. Vi estas nun 20 ope. Vi devus varbi 400 novajn lernontojn; kaj tiuj novaj pligrandigos la aron ĝis 160.000! Mi estus feliĉa se iun tagon ne plu A.P.P.K. devus festi la diplomitojn en sia malgranda ejo, sed se la urbestro povus disdoni multnombrajn premiojn al

la Esperanto-ĝelernintoj en la granda komunuma festhalo !

La disvastigo de Esperanto meritas ĉies aprobonon ! Ĉu ne estas admirinde, ke post dujara lernado estas eble posedi mondlingvon, kiam post kvar aŭ kvinjara studado de iu alia lingvo oni nur malperfekte sukcesas esprimi siajn pensojn per ĝi ? Oni jam tiel ofte instigis min lerni Esperanto. Sed... je mia aĝo ! — mi ne kuraĝis. Kaj tamen, mi ne diras ke mi ne iam malfermos lernolibron, kaj kiu scias se ne iam mi kapablos alparoli vin en via kara lingvo !

Mi estas tiel konvinkata pri la utileco kaj taŭgeco de Esperanto kaj mi promesas, mi solene promesas klopodi per ĉiuj miaj fortoj enkonduki provkursojn de Esperanto en la 4an gradajn lernejojn, se eble ankoraŭ ĉi tiun jaron !

Tion mi promesas, ĉar dank' al Esperanto mi povas esperi pli larĝan interkonsenton inter la homoj !

ESPERANTA SEMAJNO.

18an — 25an de Julio 1926a

La tutan semajnon antaŭ la ĝenerala libertempado A.P.P.K. dediĉis al Esperanto. Ni publikigas tie ĉi la koncizan programon de la okazintaĵoj, pri kiuj oni legos la detalajn raportojn en la Bulteno.

Dimanĉon, 18an, boata ekskurso al Vlissingen (Nederlando), renkonto de gesamideanoj el Suda Nederlando.

Lundon, 19an, parolado kun lumbildoj pri la kancero kaj ĝia kontraŭbatalado, de S^{ro} J. Karnas, prezidanto de «La Rekta Vojo».

Mardon, 20an, akcepto de la Ĉeĥoslovakaj lernejestroj, A. Neŭzil kaj J. Prochazka ; Sonorilarkoncerto.

Merkredon, 21an, matene, ĉeesto de la naciaj festoj kun la eksterlandaj samideanoj ; posttagmeze, ekskurso al Hemixem, akcepto de la standardo, farira de S^{ino} kaj F^{ino} Keverijn.

Ĵaŭdon, 22an, ordinara ĉiusemajna kunveno, ĝenerale ripetado por la festo.

Vendredon, 23an, parolado de S^{ro} Neŭzil en la urba industria lernejo pri «Ĉeĥoslovakujo, la Sokolaj festoj, la instruado.»

Sabaton, 24an, granda festo okaze de la 2a datreveno de la starigo de A.P.P.K.,

de la inaŭguracio de la standardo kaj de la disdono de la diplomoj de la urbaj esperantaj kursoj.

Dimanĉon, 25an, forveturo de la eksterlandaj gastoj !

Jen kiamaniere A.P.P.K. inde finis siajn laborojn de la jaro 1926-1927.

LA BOATA EKSKURSO

AL VLISSINGEN.

Fine ĝi okazis, la multe preparolita ekskurso. Preskaŭ ĉiuj Antverpenaj grupoj liveris kvanton da partoprenantoj: A. P. P. K., La Rekta Vojo, Suda Lumo, Flandrema Grupo, Geinstruistoj, Diamantistoj, Nia Ideo, jes, eĉ... La Verda Stelo estis reprezentitaj. Ankaŭ la grupo el Lier gvidita de ĝia neniam lacigebla prezidanto, S-ro Leflot kaj Nederlandaj samideanoj el Bergen op Zoom.

Je la 8a matene, per la zorgoj de S-ro Libot, la esperanto-flago kaj flagetoj jam ornamis la maston de la vaporboato «Merkator» kaj baldaŭ la ferdekoj estis okupitaj de ekskursantoj. Ni dankas tie ĉi la «Ligon de ekslernantoj de knabinaj lernejoj», kiu fakte luis la boaton, kaj al ni vendis preskaŭ cent kartojn, je favora prezo. Kvankam antaŭ longe anoncitis, dum la lastaj momentoj sin ankoraŭ prezentis novaj partoprenantoj, kiuj senkompatate estas rifuzitaj, ĉar ĉiuj kartoj estis forvenditaj, kaj ni ne rajtas tro ŝargi la ŝipon. Tiokaze diroj kiel: Mi estas la fratino de S-ro S. aŭ la nepo de S-ino M, tute ne helpas; eĉ la fratino de S-ro Zamenhof mem estus estinta rifuzita.

Je la 8.15a. ni foriris; brila vetero, antaŭe mendita, favoris la ŝipveturon. Pilotita de unu el la fame konataj Schelde-pilotoj, ni atingis Vlissingen proksimume je la 1a. Certe ni estus povintaj atingi Vlissingen pli frue, sed la ruza ŝipestro konscie igis malrapide veturi sian ŝipon je profito de la... bufedo!

En Vlissingen nin atendis kelkaj samideanoj el Bergen op Zoom kaj el la Urbo mem, inter kiuj la Esperanto-instruisto, S-ro Zegelaar kaj la delegito de U.E.A. S-ro Mast. Post mallonga refreŝigado en la centro de la urbo, ni promenis laŭlonge la marbulvardon al la banejo, kie ni disiris, por ripozi en la dunoj, promeni, bani k. t. p. Sed baldaŭ, tro baldaŭ, venis la tempo por reiri al la boato, kiun ni atingis post trikvaronhora promenado laŭlonge belaj vojoj. Je la 5.15a ni forlasis la havenon, tutkore salutitoj de la Nederlandaj samideanoj. Post gaja, ĝojplena veturado trans la belan Schelde'on, ni atingis Antverpen'on je la 9 1/4a.

La kuracilkesto, elpensajo de nia fervora samideano Van Stertegem, dufoje servis por negravaj akcidentoj. Tamen pro tio ĝia ekzistrajto pruviĝis.

La sekvantan tagon, antaŭ la parolado de S-ro Karnas, jam multaj kar- kaj ĉarmulinoj demandis: «Kiam ni havos la duan ekskurson al Vlissingen?» Jen la plej bela pruvo de ĝia sukceso. Ankaŭ la Flandrema grupo intencas okazi ĝi duan vojaĝon.

Eble..... ?

A. L.

LA REKTA VOJO.

En la granda salono de «Hôtel Cecil», la neŭtrala grupo esperantista «La Rekta Vojo», organizis la 19an. de Julio interesplenan paroladon. La parolinto, S-ro Juul Karnas, prezidanto de la grupo, elektis la temon «La Kancero kaj ĝia Kontraŭbatalado». Li tuj pruvis ke li tute majstras la elektitan subjekton. La statistikoj de la mortkvanto en la diversaj ĉeflandoj, montras ke la Kancero nuntempe postulas pinnulte da viktimoj ol la tuberkulozo. Felice de post la malkovro de la radiumo la scienlistoj povas plisukcese ataki la teruran malsanon. Tre elokvente la parolinto priskribis la historian kaj prilaboradon de tiu nova resanigilo. Multegaj estas tiuj kiuj jam dankas la vivon al tiu ĉi saviga malkovraĵo. La parolado estis ilustrita per bildoj montrantaj, gekancerulojn en la unua kaj dua stadioj, kaj la rezultatojn akiritajn post la kuracado. Ankaŭ tre interesigaj estas la bildoj de la laborejoj por la fabrikado de radiumo. La ĉeestintoj tre kontentaj pri tiu lerniga parolado, ege aplaudis la S-ron Juul Karnas.

EN HEMIXEM.

Inaŭguro de nia Standardo.

La 21an de Julio 1926a! Dua datreveno de la fondiĝo de A. P. P. K.! Festa tago por ĉiuj anoj de la aliĝintaj grupoj!

Tiun okazintaĵon ni volis rememori per amika kunestado en la gastema domo de Gesinjoroj Keverijn, en Hemixem.

Je la dua ni rorveturis al «Huis ten Halven». Dumvoje agrabia surprizo nin atendis: Haltis la veturilo por enlasi Gojnn. Jacobs kun iliaj ĉeĥaj gastoj. S-ro Neuzil, lernejestro en Olomouc-Neredin, kaj S-ro Prochazka, instruisto. Koran bonvenon! Gaja interkonatiĝo, precipe dum la promenado al Hemixem sur la dense ombrita soseco.

Kaj jen la solena momento! S-ino Keveryn, transdonas la novan, sobre ornamitan flagon al nia prezidanto, kiu, emociata, fiksas ĝin al la stango, kiun fiere tenas F-ino Lucie Keverijn. Per sentoplenaj paroloj li dankas S-inon Keverijn pro ŝia sindonemo al nia komitato kaj ofertas al ŝi belan florkorbon je la nomo, de A. P. P. K. Reciprokaj dankesprimoj. Samideanaj kisoj! Trinkado de vino je la prospero de Esperanto!

Je la ĝenerala ĝojo S-ro Neuzil rakontas gajajn anekdotojn; i. a. pri «internacia kizado dum la 4a universala kongreso». O! la ruzulo! Ne senintence li elektas tian historieton! — Ŝajne tute konsekvence li konkludas ke kun iom da envio observis antaŭe la belgan nacian kizadon. Lerta aŭskultanto bezonas nur duonan vorton! Tuj S-ino De Wagenaere donas la bonan ekzemplon, kiun sekvas la junulinoj el la grupo. S-ro Neuzil nun ne plu rajtas plendi, ke li ne konatiĝis kun la belgaj kisoj!

Nenece estas aldoni ke tuta la vespero same agrable forpasis.

Fine ĉiuj iras al la stacidomo por atendi kaj gratuli S-ron Keverijn, kiu, la saman tagon, ricevis ordenon pro 25 jara fidela servo en la ferindustrio.

La tempo forflugas. Ree ni estas en Antwerpen. Ĝis la revido! Ĝis sabato! Ĉiuj al la festo je la honoro de la diplomitoj de la oficialaj vesperkursoj.

RAPORTO PRI LA PAROLADO DE S-ro NEUZIL,

Lernejestro en Olomouc-Neredin,
(Ĉeĥoslovakujo),

farita la 23an de Julio 1926a, en la urba industria lernejo.

Dank' al la klopodoj de la prezidanto de A. P. P. K. la Antwerpen'a skabenaro metis senpage je la dispono de S-ro Neuzil la paroladejon de la urba industria lernejo kaj invitis la geinstruistaron per cerkulero sendita al ĉiuj urbaj lernejoj, ĉeesti lian paroladon, kiu temos pri : **Ĉeĥoslovakujo, la Sokol'aj festoj kaj la instruado.**

Ĉirkaŭ 50 pers. ĉeestis; la plimulto estis instruistoj kaj instruistinoj. Inter la ĉeestantoj ni precipe notis S-ron A. Finet, direktoro de la urba normala lernejo por instruistoj kaj S-ro A. Michiels, ŝtata lerneja inspektoro.

S-ro Jacobs prezentis la paroladonton al la aŭdantaro per kelkaj trafaj vortoj.

Post tio saluto S-ro Neuzil komencis sian paroladon.

Nur per Esperanto estis al li eble plene ĝui ĉiujn rimarkindaĵojn kaj festajn aranĝojn de Antwerpen. Plene da admiro li rigardis antaŭhieraŭ la de la Antwerpen'a garnizono kaj la sekvantaron de la gelnantono de la lernejoj. Kun sia arda ĉeĥa animo li partoprenis en nia nacia festo en la urba festosalonego kaj esperis ke la Belgoj venkos ĉiujn malfacilaĵojn de la nuna momento. Hieraŭ li ĉeestis la disdonon de premioj al gelnantoj de la kvaragrada lernejoj. En Ĉeĥoslovakujo oni forigis tiun ĉi disdonadon de premioj. Pri ĉiuj travivaĵoj S-ro Neuzil raportos en sia lando.

Ĉeĥoslovakujo ne estis konata antaŭ la mondmilito. Precipe en Francujo oni pensis la Bohemoj estis Ciganoj. En la antikvaj tempoj Bohemujo estis libera reĝlando. Dum 300 jaroj ĝi estis regata de Aŭstrujo-Hungarujo. Post la milito ĝi liberiĝis kaj estas nun respubliko. La surfaco de Ĉeĥoslovakujo estas 140.000 km² kaj ĝi havas 14 milionojn da loĝantoj. Ĉeĥoslovakujo konsistas el 6 landoj: Bohemujo, Moravio, Silezio, Slovakujo kaj Sub-Karpata Rusujo. 6 nacioj vivas la ŝtato : Ĉeĥoj, Germanoj, Magiaroj, Malgrandrusoj, Rumanoj kaj Poloj. Ĉeĥoslovakujo estas tre fruktodona lando kaj precipe vivas de la terkulturado. La prezidanto estas S-ro prof. Masaryk. Lia deziro estas ke la popola disvolviĝo, pliperfektigi kaj interrilatu kun la tuta mondo. Kaj tiun deziron precipe provas

efektigi la asocioj de Sokoloj. La Sokoloj precipe celas la disvolviĝon kaj plifortigon de la korpo.

Ĉiujn ses jarojn okazas en Praha tutlandaj sokolaj festoj. Ili okazis ankaŭ dum la nuna jaro. La festoj estos por la ĉeĥoj tio kio la olimpiaj ludoj estis ĉe la Grekoj. La 5-6 junio estis la ĉefaj tagoj. El ĉiuj mondpartoj venis homoj por partopreni en la grandiozaj festoj.

La asocio de Sokoloj estis fondita en 1862, de prof. Tiriš kaj lia bofrato. Sokoloj kulturas la belon kaj la bonon. La korpo devis esti bela, fortika. La Sokoloj ankaŭ ekzercas la diciplimon libervolan. La Sokola Unuiĝo kalkulas 3150 lokajn grupojn kun 628.000 membroj.

La festoj de la nuna jaro daŭris de la 6a de junio ĝis la 4a de julio.

La 4an de julio okazis la kuna gimnastikado. Estis la plej bela parto de la programo. 14.400 personoj partoprenis en ĝi. Specialajn aranĝojn oni devis preni por faciligi la aliron al la stadiono. Novajn stratojn oni faris, novajn tramvojlinojn oni konstruis, k.t.p. La mikado de la koloroj, precipe blanka, ruĝa kaj blua, la belaj korpoj de la vivplenaj atletoj ravis la okulojn. Dum la ekzercado oni aŭdis la zumadon de la kun plena energio elŝtreĉitaj brakoj. La plej bela muziko gvidis la movojn, kiuj estas ekzekutataj precize je la sama momento.

La fina ekzekutado postulas longan kaj zorgan preparadon, ĉar nur okazas unu ĝenerala ripetado. Oni nur povas partopreni en ĝi post 2 severaj ekzamenoj: unu distrikta kaj unu regiona. La festo ankaŭ postulas grandan monferon de la Sokoloj. Ĉiu partoprenanto meze elspezis 330 kronojn. La komitato konsistis el 600 personoj kaj devis zorgi por taŭge loĝigi la 600.000 vizitantojn.

La Sokolaj festoj havas grandan signifon por la ŝtato kaj la nacio. Pro pura idealismo la unuopulo obeas al la tuton. Partoprenantoj el la tuta mondo veturis al Praha. En ĉiuj landoj oni entuziasme raportis en la ĵurnaloj.

Dum la Aŭstria tempo la metodo de Herbarth estis altrudata al la ĉeĥa instruado; oni ne povis mem pensi, mem labori, nur kopii. La liberigo estis tre favora por la ĉeĥa lernejo, kies bazo ripozas sur pli da homeco. Oni denove turnis sin al Comenius, la mondfama pedagogo, kies sekvulo estas la prezidanto Masaryk. Oni dediĉas multajn zorgojn al la

korpa edukado de la infanoj. En la programoj oni aldonis laikan moralon, burĝa leĝoscienco kaj manlaboroj. Nuntempe la popola klerigo bone antaŭeniras.

La instruistoj provas akiri la kunlaborado de la gepatroj. En multaj lokoj estas societoj de la amikoj de la lernejo; kies celo estas private helpi al la pliriĉigo de la lerneja materialo kaj defendi ĝin kontraŭ eblajn atakojn.

(La fino en la sekvonta numero).

ESPERANTO KAJ LA KURACISTARO (el Volksgazet)

Okaze de la dum Oktobro en Tokio organizita kongreso de Orient - Aziaj kuracistoj, kie estis 520 partoprenintoj, kelkaj profesoroj de la Universitato de Tokio raportis pri diversaj malsanoj esperantlingve.

— Esperanto nun estas disvastigata en 100 landoj.

— U. E. A. havas membrojn en 82 landoj.

GRATULOJ.

La 27an de Julio geedziĝis S-ro Juul Karnas, la Prezidanto de «La Rekta Vojo», kun F-ino Irma Verhoeven, anino de la sama grupo. Al ambaŭ «La Rekta Vojo» kaj A. P. P. K. sendas sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

NEKROLOGO.

Sabaton, la 12an de Septembro, F-ino Bastiaens, anino de «La Rekta Vojo» subite mortis. «La Rekta Vojo» kaj A. P. P. K. prezentas sincerajn kondolencojn al la patro kaj familianoj de nia bedaŭrata, juna samideanino.

Kie renkontiĝas la Antverpen'aj Esperantistoj?

A.P.P.K.. Jaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj
Diamantistoj. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A. P. P. K.

Antverpena Polica Grupo Esperantista. En la policlernejo, Gildekamerstr., 9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hôtel Cecil, Van Arteveldestr.,

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 8.30 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A. P. P. K.

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENĀ PROPAGANDA  PORESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Ben. N. P. K.}
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

2^A JARO

N^O 10

OKTOBRO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

ĈU IO ŜANSIS ?

«Belga Esperantisto», de Aŭg.-Sept. 1926 enhavas tutaĝan raporton pri la granda festo kiun A.P.P.K. organizis la 24an de julio, okaze de la 2a datreveno de sia starigo, de la inaŭguracio de sia standardo kaj de la disdono de la diplomoj de la urbaj oficialaj vesperkursoj de Esperanto.

Kun plezuro ni notas tiun fakton kaj esperas ke baldaŭ oni taksos niajn klopodojn laŭ ĝiaj meritoj kaj ke revenos post mallonga tempo la necesega unueco kaj kunlaborado inter ĉiuj Antwerpen'aj gesamideanoj.

A.P.P.K.

ANKORAŬ NIA FESTO.

Sekvantajn leterojn ni ricevis okaze de nia neforgesebla festo.

Brussel, 19 Juli 1926.

Kunsten en Wetenschappen
Kabinet van den Minister

Mijne Heeren,

Ik heb de eer U te bedanken voor Uw vriendelijke uitnodiging op den feestavond ingericht ter eere der gediplomeerden van den stedelijken leergang in Esperanto.

Tot mijn spijt, zal het mij niet mogelijk zijn dit feest bij te wonen.

Gelieve mij te verontschuldigen.

Aanvaardt, Mijne Heeren, de betuiging van mijn hoogachting.

DE MINISTER,
(get.) CAM. HUYSMANS

Aan de hh. Voorzitter en Secretaris
van het "ANTVERPENĀ PORESPERANTO"
ANTWERPEN

Bruselo, 19 julio 1926.

Sciencoj kaj Artoj
Kabineto de la Ministro

Sinjoroj,

Mi havas la honoron danki al vi pro la afabla invito je la festvespero por la diplomitoj de la urba kurso pri Esperanto.

Je mia bedaŭro, ne estos eble al mi ĉeesti tiun feston.

Bonvolu senkulpiĝi min.

Akceptu, Sinjoroj, la esprimon de mia altestimo.

LA MINISTRO
(s.) CAM. HUYSMANS

Al S-roj Prezidanto kaj Sekretario
de la A.P.P.K.

ANTWERPEN.

Estimata Samideano,

Mi dankas vin pro la invito al via morgaŭa festo. Bedaŭrinde, ne estante libera, mi ne povos ĝin ĉeesti kaj mi petas, ke vi bonvolu senkulpigi min.

Je la nomo de "Belga Ligo Esperantista" mi deziras al via kunveno plaj bonan sukceson kaj al via Komitato plej longan kaj progreshavan vivadon.

La Ĝenerala Sekretario.
(s.) H. PETIAU

23/7/26.

Nin atingis ankoraŭ leteroj de S^{ro} Ritschie, Ĝenerala Direktoro de la urba personaro, S^{ro} A. Baesens prezidanto de la Mehlena Grupo kaj de multaj aliaj konataj Sam-oj al kiuj ĉiuj ni dankas pro ilia estimo al nia laboro.

A.P.P.K.

Urbaj oficialaj Vesperkursoj de ESPERANTO

Kvindeko da personoj sin prezentis ĝis nun por la novaj urbaj oficialaj vesperkursoj de Esperanto. Kiel la pasintan jaron estas kvar kursoj. Ili okazas en la 4a grada lernejo por knaboj, Constitutiestraat, en la urba instituto por knaboj n^o1, Louisastraat, kaj en la knaba lernejo n^o9, Pierenbergstraat, dufoje en la semajno de la 7 1/2 ĝis la 9 1/2.

En la nuna tempo de la ekoficialigo de la instruado de Esperanto ni bedaŭras ke estas ankoraŭ samideanoj kiuj ne komprenas la gravecon de tiu paŝo kaj kiuj preferas subteni la privatan instruadon. Ni tute ne povas ĝoji ke la Laborista Popola Universitato kaj la Oficista Sindikato de Komerco kaj Industrio grave malpliigis la nombron de ĉeestantoj en la oficialaj kursoj. Laŭ niaj spertoj ni devas kondamni la informon ke en 24 horoj oni plene povas ellerni Esperanton. Argu-

menti ke post tiuj 24 horoj la lernantoj kapablas memstare daŭrigi sian studadon, estas nur almontri ke ili apenaŭ povis konatiĝi kun la esperanta gramatiko kaj ke ili bezonas poste plian studadon por iĝi vera Esperantisto, t. e. persono kiu scipovas skribi kaj parole uzi Esperanton.
A.P.P.K.

RAPORTO PRI LA PAROLADO DE S-RO NEUZIL

(daŭrigo)

Oni organizas kunvenojn de la instruistoj kaj gepatroj, kun aŭ sen la infanoj. Tiuj kunvenoj ne estas ĉiam nur severe seriozaj; ofte la programo havas karakteron de amuza festo. Ekspozicioj de la laboroj de la lernantoj estas ankaŭ organizataj.

Sub la gvidado de la instruistoj la lernantoj faras komunan viziton al alia lernejo. Estas interese vidi kiel zorge la vizitatoj zorgas pri la fremdaj gastoj. El tiuj vizitoj naskiĝas reciproka estimo, servemo, k. t. p.

Kelkfoje estas organizataj ekskursoj en kiuj ankaŭ povas partopreni la gepatroj. Por ke la gepatroj interesiĝu pri la laboroj de siaj infanoj, ili estas petataj ĉiusemajne tranĝigardi la kajerojn, k. t. p.

Se komunuma administracio ne povas liveri la necesajn lernolibrojn, oni aĉetas ilin per la profito de malgraadaj festoj lernejaj.

Nuntempe oni ankaŭ organizas vizitojn de la instruisto al la gepatroj kaj de la gepatroj al la instruisto.

Multaj komunumoj jam asekuras la lernantojn kontraŭ akcidentoj. Por 75 heleroj jare ili estas asekurataj, ne nur kontraŭ akcidentoj en la lernejo, sed ankaŭ en la strato kaj hejme.

La instruistoj nuntempe petas por si universitatan instruadon. Grupo da ili eĉ petas famajn profesorojn gvidi kurson kaj mem pagas ilin.

S-ro Jacobs kore dankis S-ron Neuzil je la nomo de la aŭdantaro pro lia interresplena parolado.

Post tio la ĉeestantoj havis la okazon por admiri la multnombrajn maalaborajojn manpresite ornamitajn laŭ la speciala metodo de S-ro Neuzil.

La parolado de S-ro Neuzil denove estis pruvo de la alta praktika valoro de Esperanto.

EN ANTWERPENO !

Dum mia vojaĝo al Edinburg, mi vizitas kun mia amiko J. Prochazka, la belegan urbon Antwerpen. Dank' nur al nia kara helplingvo espe- anto, mi ĝuis en tiu ĉi urbo neforgeseblajn momentojn. Mia bonega amiko J. Jacobs kun sia afabia familio kaj kun la bonegaj gesam-ideanoj Antwerpenaj akceptis nin kaj zorgis pri ni kiel veraj fratoj. Ĉiu volis helpi al ni, ĉiu volis montri al ni ion belan, ion interesan. Ni loĝis kaj manĝis ĉe Ges-oj Jacobs kiel familianoj; ni eĉ ne rimarkis, ke ni trivoĝas en fremdlando.

Antwerpeno, vi, belega fabelo, mi neniel povas forgesi vian bildon Kion vi preparis por du simplaj ĉeĥaj instruistoj?

Apenaŭ alvenintaj jam ravis min la ĉielaj tonoj de sonorilarkoncerto, alternita de belega muziko de rigimenta muzikistaro, kiu ankaŭ ludis sur la turo de la ĉefpreĝejo. Per laŭ aŭdigo de belaj popolarioj la Antwerpen'anoj festis la antaŭvesperon de la nacia festo.

La 21an de julio ni admiris belegan nacian feston. Kiaj grandiozaj kaj belegaj bildoj! Jes, en la stratoj kaj precipe en la luksega urba halo ni vidis la kortuŝan bildon de l'amo al la patrujo kaj nacio. Ni admiris la ordon, la disciplinon, la ardecon de ĉiuj ĉeestantoj. Ni tute nature eksentis la saman amon, admiron kaj estimon al la belga lando kaj nacio, kaj ni salutis ambaŭ per la tuta arda ĉeĥa animo. Ni sentis, se ĉiu nacio povus donaci nur iom de tiu ĉi amo ankaŭ al la tuta mondo kaj al la tuta homaro, la mondo fariĝus certe vera dia paradizo.

La saman tagon portagmeze ni estis invititaj de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato al la ekskurso al Hemixem, kie simpla laborista familio pretigis belan esperantan standardon por la nomita komitato. Tie ni admiris la bonkorecon de tiu ĉi bona familio. Ni estis gastigataj, ni amu iĝis, ni ludis ludojn kaj fariĝis por kelkaj momentoj vere senzorgaj gajaj infanoj. Eĉ la vespera pluvo ne sukcesis forlavi nian bonan humoron!

La sekvantan tagon ni vizitis kun nia bonega kondukanto, S-ro Jacobs la faman muzeon de Plantin kaj ni ekvidis tre interesan laboron de kelkaj centjar-epokoj. En la Artgalerio ni konatiĝis kun la majstroverkoj de la famaj belgaj majstroj. Poste ni vizitis la urbdomon kaj miris, kiam ni ricevis tute senpage, de la Antverpena Propaganda Oficejo, tre interesajn broŝuretojn pri la urbo.

Posttagmeze ni vizitis lernejan feston: Disdonadon de la premioj. En la nomita urba halo kunvenis la delegitoj de l'urbestraro, la geinstruistaro, la gelernantoj de kelkaj lernejoj, la gepatroj kaj certe la amikoj de la junularo. Jen la programo de la festo: Alparolo de la urba

ĉefinspektoro lerneja, kantoj kun majstra akompano de bonega muzikistaro, korpekzercedoj. Jen ni estis tre surprizitaj. Kolego G. Willemsen ekzercis kun 16 knaboj ekzercojn de niaj famaj Sokoloj. La knaboj ekzercis bonege S-ro W. meritas vere specialan dankon pro la fervora laboro. Tre interesa afero por ni estis, ke ni trovis inter la lernantoj anglan knabon, kiu parolis tute bone la ĉeĥan lingvon. La plej eminenta lernanto ricevis valoran premion, librojn. Ĉiuj ceteraj ricevis belajn premiojn dediĉitajn de la urbestraro. Oni disdonas ekz.: librojn kun la bildaro de la artgalerio kun la biografioj de la artistoj, librojn kun la plej belaj aŭ memorindaj lokoj de la urbo. Mi devis admiri la korektan kaj belan sintenadon de la junularo. Ho, vi bravaj belgaj geknaboj, mi gratulas al vi kaj sendas al vi miajn plej korajn salutojn!

Post la festo mi ĝuis kelkajn agrablajn minutojn kun kelkaj belgaj kolegoj.

Vendredon matene S-ro Swalf kondukis nin afable tra la laborejoj de Antwerpen'a diamant-industrio. Ni vizitis la diamant-borson, la trezorejon, la laborejojn por la segado, tranĉado kaj facetado de la diamantoj. Ni estas ver tre dankemaj al S-ro Swalf pro lia tre interesa servo.

Posttagmeze ni estis invititaj, kore akceptitaj kaj gastigitaj ĉe Ges-oj De Waegenaere. — Vespere mi aranĝis paroladon pri la Ĉeĥoslovaka respubliko, pri la Ĉeĥa lernejo kaj pri la Sokolaj festoj en Praha kaj aranĝis ekspozicion de la laboroj de Ĉeĥaj infanoj. Ĉeestis 40 geinstruistoj, kiuj tre interesiĝis pri la paroladoj eĉ pri la laboroj.

Sabate ni vizitis la havenon. Rec ni miris, ke oni permesas trarigardi la tutan havenon. Ĉe ni oni trovas certe la tabuletojn kun la surskribo: Oni malpermesas la eniron.

Ni vidis la masekajn kaj la sekajn dokojn. Ni malsupreniris la sekan dokon kaj rampis sub grandega ŝipo kaj ŝmiris niajn surtutojn de la farbo. Ni ĉeestis la foriron de la granda Kongo-vaporŝipo «Thysville» kaj vidis unu el la plej grandaj ŝipegoj: «Belgenland».

Posttagmeze ni trarigardis unu grandan tre interese aranĝitan lernejon.

Vespere ni vizitis Festvesperon de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato. El la interesa programo mi citas la disdonadon de la unuaj oficialaj diplomoj al la partoprenintoj de la dujara urba esperanto kurso kaj la solenan inaŭguron de la flago.

Dimanĉe ni adiaŭis niajn karaĵn gastigantojn. Ni estis vere emociitaj, kiam ĉiuj familianoj kisis nin kaj larmis.

Ĉu ne estus pli bela tia fratigado de la homoj ol la nuna Faŝistigado?

Saluton al vi, bela Antwerpeno kaj bravaj Belgoj!

Albin Neuzil.

La Packongreso kaj Esperanto

Dum la preparoladoj de 25a Universala Packongreso, kiu antaŭ nelonge kunigis en Genevo 200 delegitojn el la plej gravaj landejoj el Eŭropo, bedaŭrinda maldistingebla estis konstata sekve de la diverseco de la lingvoj. Post enketo de specjala komisiono, kaj post iunda preparolado de Sinjoroj von Gerlach, Arnold Foster kaj Edm. Privat, rekomendo estis akceptita — je la iniciato de la anglaj delegitoj — celante ke, komence de la jaro 1931, dum la packongresoj ĉiuj paroladoj en nacia lingvo, estos tradukataj en Esperanton. La belga senatano, sinjoro H. Lafontaine, prezidanto de la kongreso, trege laŭdis la internacian Esperanto-movadon.

Kie pli bone estas ni ?

Gretry (1741-1813)

Plej bone estas ni
Ĉe niaj geamikoj.
El nia kor'
La zorgoj estas for;
Do kantu ni
La tuta kompani'!
Ni kantadu,
Ni dancadu,
Kaj estu gajaj ni!

Antaŭkongreso. — Lübeck (1922)

ESPERANTISTA ROMANO

La tutmonda lingvo de la Amo.

London, 9an de Oktobro.

La anglaj Esperantistoj ĝojas pri nova venko, por la unua fojo la «helplingvo» estos uzata hodiaŭ anstataŭ la angla lingvo en la anglikana rito, okaze de interesa edziĝo, kiu okazos hodiaŭ posttagmeze, en la preĝejo de Sankta Georgo, en la urbkvartalo Bloomsbury.

Sajnas ke ne estas absolute la unuan fojon, ĉar diservoj en Esperanto jam okazis en protestantaj preĝejoj en Germanujo kaj Aŭstrujo. Sed, tie-ĉi, estas tute nova fakto. Estas ricevita la permeso de la eklezia aŭtoritato — en tiu-ĉi okazo; la episkopo de Willesden — Cetere, oni preskaŭ ne povis rifuzi ĝin, ĉar la artikolo 24 de la ritaro, fiksita per akto de la Parlamento, deklaras ke la ceremonio de la edziĝo devas okazi en lingvo komprenata de la edziĝantoj, kaj la estonta edzino, kiu flue parolas ok lingvojn, — naŭ kun Esperanto, — ne scias unu vorton en la angla lingvo. Pastro, la Rev. R. J. Ashley, fama Esperantisto, venis el la nordo de Anglujo, por beni la novajn geedzojn; la organisto de Sankta Georgo, kiu estas ankaŭ bonekonata artisto de muzikejo, komponis muzikon je himno en Esperanto speciale skribita por tiu-ĉi okazintaĵo.

« Estas, diris la fianĉo, S-ro Jackson Coleman, ano de la Londona advokataro, la epilogo de bela romano. » Antaŭ du jaroj, S-ro Coleman, iris por ĉeesti esperantistan kongreson en Salzburg. Dum la kunvenoj li havis kiel najbari non tre belan junulinon, kaj ili parolis, kompreneble, en Esperanto. S-ro Coleman deklaras ke, almenaŭ por tio kio koncernas lin, estis la

amo de la unua vido. Li demandis al ŝi ĉu ŝi estis edziniĝinta, kaj ŝia nea respondo plenigis lin je ĝojo kaj espero. Ili interŝanĝis siajn adresojn kaj promesis skribi unu al la alia; poste la anglo iris por kapti la vagonaron por reveturi al Anglujo. Sed li estis restinta babilante tro longtempe: la vagonaro estis for, kaj li pasigis la nokton en la atendejo, tro okupata pri sia romano por ke li povu dormi. Finfine li decidis ke, anstataŭ forveturi, li reiros la morgaŭan tagon por vidi ŝin. Lia restado en Salzburg pliongiĝis je tri tagoj. « Post tio, diris S-ro Coleman, ni skribis unu al la alia. Estas tiel facile skribi amleterojn en Esperanto. Dank'al la pligrandiga sufikso kaj al aliaj profitoj de la nova lingvo, oni povas esprimi sin kun pli da pasieco ol en kiu ajn alia idioma. » La pasintan jaron ili havis kune kelkajn semajnojn da libertempo en Italujo kaj, antaŭ nelonge, kiam S-ro Coleman preparis sin por fari al ŝi sian edziĝproponon, li ricevis ŝian! La nova edzino, f-ino Muzza Shoenu, estas 29 jara, kaj S-ro Coleman estas ankoraŭ en la »sunlumigita flanko de la kvardeko jaroj.

Ŝi estas talentplena violonistino, filino de eksmuzikisto de la Kortego de Franz-Josef kaj de la reĝo de Rumanujo. La bela aventuro havas por ŝi iom da «Locarn'ajo».

« Antaŭ dek jaroj, ŝi diris, mi kriis: « Dio punu Anglujon! » Antaŭ kvin jaroj mi kredis ke ĉiuj Angloj estis malvarmaj kiel glacimontoj kaj strangaj kiel karikaturoj. Hodiaŭ, mi scias ke ili havas la koron tiel varman kiel miaj samlandanoj. Mi eĉ kredas ke ili estas pli ĉarmaj. »

(Tradukita el "Le Soir").

LA REKTA VOJO.

Okaze la unuan datrevenon de sia fondiĝo, tiu ĉi kiubo organizos bankedon, la 20an de novembro en «Hotel Cecil», van Arteveldestraat, 8, salono Nr 23.

La estraro elektis menuon, kies nura legado jam kaŭzas bonan apetiton. La partoprena prezo: estas 22 frankoj (enkalkulita trinkmono por la servistaro). Ĉiuj Esperantistoj estas invitataj.

La membroj de «La Rekta Vojo» ĝuas malpliigon de la prezo, laŭ la enhavo de la monskatolo. Ju pli da membroj, forrestos, despli profitos la partoprenontaj membroj kaj des malpli ili bezonas pagi.

Estas konsilinde dum kelkaj tagoj antaŭe fasti, porke la delikataĵoj trovi facile la rektan vojon.

Oni sin enskribu antaŭ la 13-an de novembro dum la kunvenoj, aŭ ĉe S-ro A. Lodema, Kalversstraat, 12, Antwerpen - Dam.

Notu bone. — La 24-an de decembro granda balo en la salono «Van Wesenbeke», van Wesenkestraat.

Ekskurso al Lier

Okaze de la parolado pri Finlando kun lumbildoj de S-ro J. Jacobs A.P.P.K. organizos ekskurson al Lier la 28an de novembro Forveturo je la 2a el Oude-God per speciala autobuso.

Ĉiuj gesamideanoj estas bonvenaj.

ADRESSANGO.

S-ro A. Lodema, kasisto de «La Rekta Vojo» al: Kalversstraat, 12 Antwerpen-Dam.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Gen. 1924}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

2^a JARO

N^o 11

NOVEMBRO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo : 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

METODOJ DE PROPAGANDADO DE ESPERANTO

Pri la metodoj de disvastigo de Esperanto oni parolis ĉie kaj ĉiam tiom multe kaj detale, ke oni apenaŭ povas aldoni ion novan. Al ni estas proponitaj multaj ebloj neakcepteblaj aŭ konvenaj ĉe niaj kondiĉoj. Iu havas fruktojn, alia, male, povas efiki malakele. Ĉar mankas tempo kaj ebloj, mi volus nur per kelkaj mallongaj frazoj montri, kio, laŭ mia opinio, estas konsiderinda por rezultoza propagandado. Apenaŭ mi povas diri ion originalan aŭ gravegan. Mi volus citi laŭvice la ĝis nun uzitajn metodojn kaj aldoni kelkion al ili.

Klasifikante la metodojn de propagandado de Esperanto oni povas dividi ilin en du partojn laŭ tio, kiom estas aplikita iu ajn el ili: 1. la jam uzitaj ebloj kaj 2. proponataj aŭ ĝis nun malmulte konsideritaj.

Oni propagandas kaj propagandis ĉe ni precipe per paroladoj, ekspozicioj, kursoj, okazaj ĵurnalaj sciigoj kaj tradukado de la estona literaturo. Mi iom pririgardus ilin.

Parolado estas unu el la plej efikaj propagandaj rimedoj. Kiam ĝi estas verva kaj altira, tiam ĝi povas akiri dekojn, eĉ centojn da novaj adeptoj per unu fojo. La oratoroj estu bonaj, la temoj ne tiom gravas. Bedaŭrinde ni ne ha-

vas bonajn oratorojn, povantajn sorĉi la aŭskultantaron. Ni devas eduki oratorojn! Sed kiel? Plej bona rimedo por tio estas debataj aŭ paroladaj vesperoj aŭ kunvenoj inter la anoj de iu ajn societo. Temoj por tiaj debatoj estu tute egale kiaj, kvankam tiuj pri la internacia lingvo havas duoblan utilon. La paroladaj kunvenoj ne limiĝu je feferadoj, sed estigu viglajn disputojn. Multaj porsonoj povus spertigi tiamaniere. Bonajn parolantojn akiras ankoraŭ alia rimedo. Oni penu esperantistigi aŭ almenaŭ konatigi kun Esperanto ulojn kun oratora talento. Krom tio oni povos peti por parolado famajn parolantojn, favorajn al la ideo de internacia lingvo.

Sed oni ne lasu sur podion malbonajn parolantojn. Por la balbutulojn kaj ĉarlatanojn! Ni ja ofte spertis, ke malbona «oratoro» malhelpas pli multe ol helpas. Okazis, ke post propaganda parolado, partoprenita de grandnombria publiko, ekmalprogresis la movado, aŭ la parolado havis absolute neniajn pozitivajn rezultojn. Propagandantoj penu paroli ne nur flue, sed ankaŭ serioze kaj solide. Oni ne penu paroli nur parkere. Konspekto estas permesata, eĉ rekomendata.

Interalie la oratoroj bonege konu la lingvon, en kiu ili parolas. Oni ofte aŭdis, kiel iu oratoro estis poste mokata pro sia malbona lingvo.

ke oni alpenaŭ povas aldoni ion novan. Al ni malbonan opinion pri la persono parolanta kaj indukcie pri la tuta movado.

Ofte la paroladojn sekvas ekspozicio pri Esp. literaturo, disvastiĝo, uzateco k. t. p. Tio estas bona ideo, ĉar la vidaj perceptoj akcelas pli bonan komprenadon de la faktoj menciitaj. La ekspozicioj montru multum, non multa. Plej gravajn faktojn ili prezentu. Laŭ medio oni devas elekti ĝian enhavon. Dum parolado al komercistoj la ekspozicioj konsisto el komercaj adresaroj, reklamiloj, komunikiloj, al lernantoj oni montru diversajn librojn, poŝtkartojn ricevitaĵojn per internacia korespondado, vojaĝeblaj k. t. p. Samo estas direbla pri parolado. Sama persono parolu pri sama temo alimaniere al alia publiko. Lernantoj ne interesigas pri komerco kaj komercistoj pri pedagogio.

La desegnaĵoj, diagramoj, surskriboj, uzataj por ekspozicio, estu faritaj de spertulo.

Pri la metodoj de kursgvidado ne estas eble paroli detale. Nur ion mi volus diri. Ofte oni laŭdas la metodon «studado per instruado». Ĝi estas malbona pro tio, ke la lernantoj ekdubas pri la flueco kaj praktika uzeblo de la lingvo, kiam la instruisto nek parolas nek konas la vortterzonon.

Al la kvara kaj kvina propagandaj rimedoj — ĵurnalaro kaj beletristiko — ni revenos post kelkaj enkondukaj vortoj ĉe la metodoj ĝis nun malmulte uzitaj.

Kio nova estus akdonebla al la cititaj propagandaj manieroj? Nuna propagando estas pli-malpli teoria. Oni devus anstataŭigi la teorion propagandmanieron per la praktika Ni multe parolis pri dekmiloj da uzantoj de la lingvo, pri miloj da libroj aperintaj en ĝi, pri multaj firmaoj kaj entreprenoj, uzantaj ĝin, pri Esperanto kaj scienco k. t. p. Ni pentris plej belajn kaj miraĝajn bildojn al la aŭskultantoj. Ĉu multo ne restis miraĝo? La publiko volas vidi, aŭdi ĉion per propraj okuloj kaj oreloj, palpi per propraj manoj. Nur tiam ĝi konvinkigās kaj ekkredas. Multo estas jam farita en tiu ĉi rilato, sed plimulto estas farinda. Per praktiko ni propagandu. Mi mencias nur kelkajn erojn de la internacia vivo, kien Esperanto devus penetri. Ĉe ni Esp. kaj komerco estas tute fremdaj, dum en multaj landoj ili estas intense kunigitaj. Per Esperantaj reklamiloj, komercaj adresaroj, korespondado k.t.p. oni instigu niajn komercistojn, ekspoziciojn ekuzi Esperanton. Estas ĝenerala aprobo de Esperanto en komercistaj rondoĵoj. Ni ne hezitu utiligi la okazon.

Inter intelektuloj bona konvinkilo estas la valoro kaj amplekso de Esperanta literaturo. Oni jam faris multon en tiu ĉi rilato. Relative kun aliaj nacioj la estonoj estas en bona stato. El la estona literaturo oni tradukis diversajn valorajn beletristikaĵojn. Beletristiko estas eble

sola riĉaĵo proponenda al internacia publiko. Do oni pluiru tiun ĉi vojon. Sed oni aperigu en Esperanto ankaŭ ĉiun sciencajn artikolon, povantan interesi eksterlandanojn.

Nun mi volus esprimi kelkion, kio, eble, ŝajnas jezuita al iuj. Ni esperantistoj, penu penetri en ĉiujn societojn, kies programo estas konforma al Esperantismo, kie oni favore rilatas al Esperanto. En tiaj societoj estas ofte aranĝataj referadoj. Ni havas bonan okazon por utiligi tiun eblon kaj povus konatigi ceterajn societanojn kun Esperanto.

Gazetaro povas fari miraklojn en nia tempo. Ni ataku ĝin pli forte, pli intense. Oni fondu ian komision aŭ ion similan, kiu senĉese informos la gazetojn pri Esp. novaĵoj. Parolante pri la gazetoj oni devus atentigi nin pri kelkio. Al vasta publiko oni montru nur la bonajn flankojn de la Esp. movado. Tre ofte troviĝas tre naivaj sciigoj, kiuj estas evitendaj.

Ni uzu Esp. ĉie praktike, montrante tiel, kie ĝi estas vere uzebla.

Oni atentigu oficialajn ŝtatajn kaj urbajn adresarojn pri enkonduko de Esp. apud aliaj lingvoj.

P. PERG.

El " Informoj de Estonio "

JUBILEA STATISTIKO.

Por kontentigi la oftan demandon pri ciferoj koncerne nian movadon kaj por respondi al nepre bezono ĝenerale, en la konferenco de Locarno estis decidite, ke I. C. K. okaze de la 40-jara jubileo de Esperanto en 1927 publikigu tian statistikon por helpi nian propagandon.

I. C. K. konfidis tiun ĉi laboron al sia ŝatata Fakestro por Statistiko kaj Instruado Sro Prof. Dro Dietterle, Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig.

Post serioza preparado ni povis jam publikigi specialan artikolon pri tiu ĉi statistiko en «*Esperanto*» de U. E. A. en «*Heroldo de Esperanto*», dank'al la afableco de la redakcio kaj, interkonsente kun la Plenuma Komisiono de «*SAT*» en «*Sennaciulo*».

Ni iru la plej simplan kaj plej malmultekostan vojon! Estos nur necese, ke ĉiuj Esperanto-grupoj kaj rondoj (tute egale, ĉu ili estas, organizitaj en iu ajn asocio aŭ ne!) oferu kelkajn minutojn da laboro, krom tio du paperfoliojn kaj unu poŝtmarkon; la samon faru la diversspecaj asocioj kaj ankaŭ la esperantistoj vivantaj izole. Pripensu mian planon kaj, konsentante ĝin, agu tuj laŭ la plano proponita. Ĝi baziĝas sur la konvinko, ke nia Esperanto-gazetaro, kiu ĉiam estis oferema kaj helpema, helpos la efektivigon de la plano, represigante ĉi tiun mian alvokon. Ni ne bezonos la multekostan forsendon de presitaj demandoj el iu ajn centro, ni ne bezonos financon subtenon.

Mi proponas al vi, respondi al tri demandaroj, unu por la ĉiuspecaj grupoj, unu por la asocioj inter kaj sennaciaj, naciaj, fakoj, unu por la izole vivantaj esperantistoj.

*Demandaro por grupoj
(societoj, kluboj, rondoj k. s.)*

1. lando kaj landparto ?
2. loko ? (urbo aŭ vilaĝo ?)
3. nomo de la grupo aŭ rondo ?
4. al kiu organizaĵo la grupo apartenas ? (nomu la organizaĵon !)
5. kiom da membroj via grupo havas je la fino de l' jaro 1926 ?
6. kiom da kursoj la grupo organizis
 - a) dum la jaro 1925 (enkalkulite la ĝis nun nefinitajn)
 - b) de post la starigo de la grupo entute ?
7. ĉu en via loko ekzistas aliaj Esperanto-grupoj ? kaj kiuj ? (demando nepre respondenda pro la kontrolo, ĉu la statistikestro ricevis ĉiujn sciigojn el via loko)
8. kiom da esperantistoj en via loko ekzistas ekstergrupaj entute ! (kalkule singardeme ! nepre ne taksu tro alte ! Preferu noti ciferon pli malaltan, sed tute fidindan !)
9. ĉu via grupo
 - a) havas bibliotekon ?
 - b) kun kiom da libroj ?
10. tre preciza adreso de via grupo ?

Subskribo de l' raportinto.

La aliĝintaj grupoj estas petataj sendi la saman statistikon al la sekretario.

EKSPERIMENTO BOVET

Kion vi faris por subteni la eksperimenton de Prof. Bovet ?

Interrilatu pri ĝi tuj Prof. P. Bovet, Institut J. J. Rousseau, 4, rue Chas. Bonnet, Genève (Svislando).

INTERNACIAJ KONGRESOJ

Ne **agu en ili**, ne petinte ekzempleron de l' Konsilaro pri la agado ĉe internaciaj kongresoj eldonita de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, 12, Bd. du Théâtre, Genève.

RADIO - PROPAGANDO

Ĉu vi jam faris vian propagandon en radio-rondoj ? Radio estas unu el niaj plej gravaj kampoj !

La pacifistoj kaj Esperanto

La XI. Nacia Kongreso de l' Paco, kiu okazis en Valence (Francujo) adoptis en sia kunveno de l' 24 septembro 1926 la sekvantan rezolucion :

Konsiderante, ke la Universalaj Pac-Kongresoj de Luzern en 1905 kaj de Paris en 1925 esprimis sin favore al la helplingvo Esperanto,

Konsiderante, ke tiu ĉi lingvo helpa estas nun adoptita de la plimulto de l' grandaj organizacioj universalaj kaj oficialaj,

Konsiderante, ke por la amasoj, kiuj ne transpasas la elementan edukadon, Esperanto, prenita kiel dua lingvo kaj logika mekanismo, povas esti bonega instrumento de kulturo, favora unuflanke por pli perfekta kono de la gepatra lingvo kaj aliflanke por la ebleco de konversacio inter la diversaj popoloj,

La XI. Nacia Kongreso de l' Paco :

1. petas la instruistojn, instruistojn kaj instruistojn klopodi lerni tiun ĉi lingvon, kies akiro estas relative mallongdaŭra kaj facila. Ĝi invitas ilin per ĉiuj rimedoj fari ĉion eblan en ĉiuj urboj kaj en la kamparo por instrui (ekster la klashoroj) Esperanton al infanoj de ambaŭ seksoj de l' plej frua aĝo.

2. La kongreso invitas la publikajn aŭtoritatojn studi la rimedojn, kiuj ebligas la enkondukon de tiu ĉi dua lingvo en la programojn de la unuagradaj aŭ eĉ elementaraj lernejoj.

I.E.S.

La fervojistoj kaj Esperanto

Esperanto faras jam gravajn servojn en la turismo. Oni do komprenas ke ĝi interesas pli kaj pli la personaron de la fervojoj.

La lasta kongreso de la Svisa Federacio de Fervojistoj en Bern, de 3 - 4 julio 1926 akceptis la sekvantan rezolucion :

La kongreso aprobas la movadon favore je internacia helplingvo. Ĝi rekomendas al la membro de la Federacio la studon de Esperanto, kiu estas la plej disvastigita.

I.E.S.

La Poŝto kaj Esperanto

La komisaro de l' P.T.T. de la Soveta Unio per speciala dekreto de l' 17 junio 1926 (N^o 6/304) allasis Esperanton en la nombro de lingvoj, permesitaj en telegramoj en Ruslando.

Estas memorinde je tiu ĉi okazo ankoraŭfoje, ke post la 1 novembro 1926 Esperanto estas oficiale rekonita kiel "lingvo klara" en la internacia telegrafia servo.

I.E.S.

RICEVITAJ

Esperanto Zakwoordenboek bewerkt door A. Blok, schrijver van "Het Esperanto in twintig lessen". — Esperanto - Nederlandsch, 2600 Esperanto stamwoorden met de Nederlandsche vertaling. — Nederlandsch - Esperanto, 3400 der meest voorkomende Nederlandsche woorden met de vertaling in Esperanto. Eldonis W. Zwagers, Rotterdam, Nederlando. — Prezo: 75 Ned. cendoj. — Ambaŭ partoj estas ankaŭ aparte haveblaj. Presita en klara litero, laŭ oportuna poŝformato, ĝi enhavas preskaŭ ĉiujn Esperantajn radikojn, dum la Nederlanda parto ĉio enhavas kio estas necesa en la ĉiutaga vivo.

Baha' u' llah kaj Lia Misio, de D^o John E. Esslemont, esperantigita el la angla originalo. — Publikajo nº 2 de la Esperanto komitato de la Bahaji - movado Hamburg. — Prezo ne montrita.

La Sekreto de Karlo Van de Beek.

ANTAŬPAROLO AL MIAJ BELGAJ LEGANTOJ.

La nomoj de personoj cititaj en mia verko ne estas la veraj, mi petas la «Van de Beek», «Marien» k. t. p. senkulpigi min pro la uzado de iliaj nomoj. Ili ne ludas rolon en mia rakontaĵo.

Salvatoro.

LA SEKRETO DE KARLO VAN DE BEEK. (1)

En la jaro mil naŭ cent deknaŭ mi vizitis la parton de Belgujo kiu tiel multe suferis de ambaŭ militintaj fortoj.

La lastan tagon mi estis en «Nieuport» (2), en la parto apud la marbordo, kaj mia vagonaro nur forveturis je la tria vespere (la 15a en Belgujo). Ĉar la vetero estis bela, mi luis barkon kaj faris ekskurson sur la Norda Maro. Dum nia navigado ni rimarkis vinbotelon naĝantan sur la akvo. Ni ĝin kaptis. Mi ĝin kunportis hejmen, kiam mi je la dekvina forveturis al Furnes (3) kaj de tie al Malines (4) la urbo, en kiu mi loĝas.

Estis videble ke la botelo enhavis paperaĵojn kaj sufiĉe longan tempon naĝis en la akvo, ĉar la ciro, kiu fermis ĝin, estis difektita. La paperoj estis malsekaj kaj ne forglitis el la botelo. Mi rompis la botelon kaj la tri sekvantaj dokumentoj aperis.

Iru ĉ vi eksci	Furnes, kaj an Van
Chemist w w my scc Dec Charles	yod
Renbez- de Furnes sécet.	rez mon cembre 191 de Beek

La marakvo forviŝis multajn vortojn, tamen per la ĉeesto de la tri dokumentoj mi elpensis la tutan. La unua certe estis esperante skribita, ĉar mi vidis la verbon *iri*, la vortojn *kaj*, *vi*, la radikojn *eksci*.

La dua estis angle redaktita, tion montras la vortoj: *chemist*, *your* kaj *my*; ili signifas: *apotekisto*, *via* kaj *mia*.

La tria estis kunmetita el francaj vortoj kiel: *rendez* (traduko de *iru*) *mon* (mia) *secret* (sekreto).

De la tuto mi kunmetis la proksimuman daton. La vera jaro ne estis legebla.

Estis skribaĵo de nia samideano Karlo Van de Beek, ĝi estis skribita la dekan de Decembro 191? a.

Mi konatigis kun Karlo Van de Beek dum mia militservo. Malfeliĉe mi nur vidis lin unu fojon.

Jen kiel mi kunmetis la pripenson de Karlo:

« Iru ĉe la apotekisto de Furnes kaj vi ekscios mian sekreton.

La dekan de Decembro 191? a.

Karlo Van de Beek. »

(daŭrigas)

(1) Van den Beek. — estas flandra familnomo elparolata kiel: Van d bek, la e kiel la franca «é».

(2) Nieuport. — Por la urbaj nomoj mi ĉiam uzas la francan (la plej konatan) Flandre la nomo estas Nieuwpoort. Elp. Nivport.

(3) Furnes. — Vidu (2). La Flandra estas Veurne. Elp. Veŭrn. Fama vendloko de butero.

(4) Malines. — Vidu (2). La flandra nomo estas Mechelen. Elp. Mehln. Fama pro sia puntaj kaj fabrikejoj de meubloj.

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENĀ PROPAGANDA E POR ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHĒ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SMIEDERSSĒTRAAĒT 51

2[^] JARO

N^o 12

DECEMBRO 1926

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo : 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 6. — Bfr.
" 0,60 Bfr.

15 Decembro 1859

Naskiĝis nobla geniulo.

Ĉu estis la providenco kiu naskiĝis lin en la sama monato kaj suferiĝis lin tiel, kiel tiu alia geniulo kiu, antaŭ preskaŭ dumil jaroj, estis vokita por helpi la suferantan Homaron?

Ne plu li povas doni al ni siajn saĝajn konsilojn. Kiel li gojus vidante la progreson de nia movado. Sed li ne plu estas. Kaj ni, kiuj nur daŭrigas la de li komencitan laboron, ĉu ni ne tro facile forgesas lin, nian grandan mortinton, kiu dediĉis ĉion, kion li povis doni, por la realigo de sia vivcelo. Nur unu momenton ni ne dediĉas al lia memoro.

Kiu el ni, la mano sur la koro, kuraĝas diri esti pensinta, tiun tagon, al nia kara Majstro? Certe, la terura lukto por la ĉiutaga pano, en nunaj cirkonstancoj, por diversaj popoloj ne permesas perdi eĉ unu momenton. Kaj tamen la nerva moderna vivo, en kiu ĉiu momento valoras

oron, perdas ĉiujare kelkajn minutojn por funebre rememori la mortintojn de l' granda mondmilito.

La 15a de decembro ne estas do, sed ĝi estu por ni rememortago, la Zamenhofa tago. Ĉiu el ni, dum laboro aŭ promenado, tiun tagon restu senmova, nur unu minuto, pensante respektplene al tiu vivo, tiel senprofite donita por la efektiviĝo de iu idealo, kaj aŭdiĝas nur la korbato de tiuj homoj kiuj ankaŭ adeptis tiun idealon.

A. Posener

ĜENERALA JARKUNVENO DE A. P. P. K.

La ĝenerala jarkunveno de A.P.P.K. okazos jaŭdon la 17an de februaro 1927, je la 8a vespere, en la sidejo "Centraal Schouwburg".

La tagordo estos komunikata je la komenco de februaro.

AL LA ABONANTOJ DE NIA BULTENO

La abonantoj de nia bulteno estas petataj pagi kiel eble plej baldaŭ sian abonon al la administranto, s-ro J. Swalf, Aug. Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Oni atentu la novajn prezojn:

Belgujo : 3 Bfr.

Eksterlando : 1,25 Svis. fr. aŭ egalvaloro.

EDUKA PAGO DE L'INSTITUTO J. J. ROUSSEAU.

OBJEKTIVA KONTROLO DE ESPERANTO - INSTRUADO.

La sukcesplena konferenco en Genève, 1922, unuanime deklaris ke estus plej interese organizi, laŭ precize difinitaj kondiĉoj, provojn pri la rezultoj de Esperanto-Instruado. La «Institut J. J. Rousseau», en Genève, havas nun la eblon entrepreni unu, aŭ pli ĝuste du tiuspecajn eksperimentojn, kies valoro estas ankoraŭ pli grandigita per la fakto, ke ĝi kunlaboros kun D-ro Torndike, de «Institute of Educational Research of Teachers' College of Columbia University, New York City».

Sajnas al ni oportune doni ĉi tie kelkajn informojn pri la projekto de tiuj du eksperimentoj.

Unua Eksperimento.

La unua plano interesas ĉiujn Esperanto-kursojn, en kiaj ajn kondiĉoj ili okazas; (estus eĉ interese ricevi la rezultojn atingitajn de izoluloj studentaj Esperanton per si mem, sen instruanto).

La ideo de D-ro Torndike estas apliki al Esperanto lingvotestojn (1) similajn je tiuj kiuj estas ĉiam pli kaj pli uzataj en Usono, por kontroli instruadon de gepatra lingvo, de vivantaj fremdaj lingvoj, kaj de mortintaj lingvoj. Tiuj kiujn oni nun proponas al ni rilatas al:

- a) kono de vortoj.
- b) kompreno de presitaj frazoj.
- c) legado de presitaj tekstoj.

En New York estis preparitaj formularoj, kiuj, post serioza kontrolo de kompetentaj esperantistoj, estis adaptataj tiamaniere ke ilin povos uzi personoj parolantaj diversajn naciajn lingvojn.

Por sciiĝi, ekzemple, ĉu franco aŭ ĉeĥo komprenas ian esperantan vorton, oni presas apud

(1) Testo signifas «preciza ekzameno farita en difinitaj kondiĉoj, sub la bazo de science elaborita demando aŭ enketo».

tiu vorto kvar vortojn en lia gepatra lingvo, el kiuj nur unu povas klarigi la esperantan; ĉi tiun la lernanto devas trovi kaj substreki.

Rilate al kompreno de frazoj, oni redaktis kelkajn propoziciojn, el kiuj ĉiu enhavas ordonon, facile tuj plenumeblan. Ekzemple: «Metu punkton super la vertikala linio». La frazoj esprimantaj tiujn ordonojn ĉiam pli kaj pli malfaciliĝas; ilia interligo formas do kvazaŭ skalon.

Ankaŭ la tekstoj konsistas el gradigitaj paraĝrafoj; pri ĉiu el ili kelkaj demandoj estas faritaj.

La tuto starigas, kiel oni vidas, interesan ekzamenon, kiu havas la avantaĝon ebligi kvantaj rilatojn, specon de mezurilo pri kono de Esperanto, almenaŭ rilate al legado en tiu ĉi lingvo.

Nia intenco estas ebligi, per tiuj testoj, kontrolojn de la diversaj etapoj dum la lernado, kaj taksadon de la rapideco kun kiu la kursanoj lernas Esperanton. Estos do interese mezuri iliajn lingvajn sciojn, ekzemple post dek kaj post tridek lecionoj.

Ĉar Esperanto havas multajn komunajn trajtojn kun naciaj lingvoj, estas eble kaj interese fari tiujn testojn ne nur post la kurso, por konstati ĝian rezulton, sed jam antaŭe, por scii kiom jam komprenas aŭ divenas la lernantoj per siaj aliaj lingvaj konoj. Estus ankaŭ interese mezuri la atingitajn rezultojn laŭ diversaj kategorioj de lernantoj, ekzemple laŭ aĝo, gepatra lingvo, antaŭaj lingvaj scioj, ĝenerala inteligento, ktp.

Tiurilate la «Institut J. J. Rousseau» speciale ŝatus interrilati kun kiel eble plej multaj kaj diversaj psikologoj kaj pedagogoj spertaj pri testoj kaj psikologiaj ekzamenoj.

Dua eksperimento.

La dua eksperimento postulas multe pli da tempo kaj penado. Ĝi intencas mezuri la rezultojn de Esperanto-instruado en la programo de kelkaj lernejoj. Kontraŭ enkonduko de Esperanto en la lernejoj, oni ofte pretendas ke la programoj estas jam troŝargitaj. Por respondi al tiu skrupulo ni proponas sekvantan provon:

Unue kaj dum unu jaro, Esperanto anstataŭus en la lerneja programo la unuan fremdan lingvon, (ekz., en la franca parto, de Svislando, ĝi anstataŭus la germanan). La faktoj priskribitaj dum la Geneva konferenco rajtigas nin opini, ke tio prezentos, ĝuste je vidpunkto de tiu unua fremda nacia lingvo, ne perdon sed profiton, pro la prepara valoro de Esperanto.

Post unu jaro, instruado de Esperanto por si mem estus interrompita; la fremdaj lingvoj reaperus sialoke en la programo; sed Esperanto tamen restus en ĝi, ĉar oni donus geografi-ajn lecionojn en Esperanto. Se ni elektas tiun ĉi fakon, estas ĉar Esperanto ebligas — kaj

tion ni konsideras plej grava — vere vivan instruadon de prihoma geografio, permesante al la lernantoj korespondi kun infanoj diverslandaj, kun turismaj oficijoj, internaciaj foiroj, ktp. Estos bonega okazo apliki la principojn de «aktiva lernejo», aŭ de «project method» kiel diras la Usonanoj.

Komprenoble tio ĉio devas esti zorge preparata, almenaŭ per publikigo de gvidlibro por la instruantoj, enhavanta didaktikajn kaj bibliografiajn informojn, eble eĉ per eldono de unu aŭ pluraj lernolibroj. Se oni bone komprenis nian planon, oni rimarkas ke ni havas por tiu preparado certan tempon antaŭ ni, ĉar la lernejoj komencos tiun ĉi parton de la programo nur en la dua eksperimenta jaro.

Kion ni demandas jam nun al niaj legantoj, estas kompreni la gravecon kaj intereson de tiu pedagogia klopodo kaj helpi nin per ĉiuj rimedoj, parolante pri tio al siaj konatuloj. Ni ĝojus interkorespondi por ricevi proponojn kaj por dori detalajn informojn.

P. BOVET.

El «Esperanto».

LA REKTA VOJO.

La 1a ĝenerala kunveno okazos sabaton, la 22an de januaro en «Hôtel Cecil», Van Arteveldestraat, 8, je la 8a vespere.

Por festi la unuan datrevenon de sia starigo, la grupo «La Rekta Vojo» organizis festenon, kiu okazis, sabaton, la 20an de novembro en ĝia sidejo «Hôtel Cecil», 45 personoj partoprenis en la festeno, kiu estis sukceso.

Salutinte la gajajn atendantojn, ni estas tuj petataj preni bileton, kiu montras nian sidlokon; la blinda hazardo decidis kiu estas nia ĉarma najbarino. Post tio ni havas la okazon por rigardi la salonegor. La scenejo estas belege ornamita per la flagetoj esperantaj kaj de ĉiuj landoj de la mondo; granda portreto de la Majstro okupas la mezon.

Je la fiksita horo ĉiuj sidigas en siaj montritaj lokoj. S-ro Roelants okupas la honoran lokon. La prezidanto donas la signalon kaj la bongustaj manĝaĵoj faras siar eniron. Inter la servado de la pladoj estis kvazaŭ ĉiu samideano faris konkurson por kiel eble plej multe amuzi la aliajn. Piano- kaj mandolinludado, gajaj kantoj kaj deklamoj sinsekvis preskaŭ sininterrompe.

Je la postmanĝo S-ro Jacobs, prezidanto de A. P. P. K., transdonis je la nomo de tiu centra organizaĵo la sincerajn gratulojn kaj la simpatiajn bondezirojn por daŭra prosperado de la «Rekta Vojo».

Kiam ĉiuj, bongustaj estis malaperintaj en la avidoj keloj, la amikaro ne povis tuj disiĝi. Baldaŭ la notoj de plej bela dancmuziko movigis la dancemulojn.

Estis jam en la fruaj matenhoroj kiam la lastaj foriris. Ĉiuj iris lejmen plej kontentaj.

La festeno sukcesis tre bone kaj nur la partoprenintoj malpravis.

NIA AGO. — NIA IDEO.

Dimanĉon, la 27an de oktobro la socialista esperantista grupo «Nia Ago» de Hoboken helpita de la grupo «Nia Ideo» de Antwerpen, organizis feston okaze de la disdono de atestoj pri simpla kapableco al la lernintoj de sia somera kurso.

La programo tre lerte kaj plej internacie konmetita enhavis belajn hor- kaj solkantojn, kaj sol- kaj hordeklamojn. Ĝi montris ke per Esperanto estas eble al ni konigi kaj ĝui la arttrezorojn de aliaj popoloj. Krom Flandraj kantoj, ni aŭdis Rusan, Finnian, Germanan kaj Polan kantojn. Per varmaj aplaŭdoj la aŭdantaro dankis la lertajn kantintojn kaj deklamintojn. Speciale tamen ni devas mencii la graciajn ritmajn dancadojn kaj la carman mandoliludadon de la A. J. Grupo.

Inter la 1a kaj 2a parto la prezidanto de «Reis- en Studiekring» dankis je la nomo de tiu ĉi grupo pro la nobla laboro kiun liveris «Nia Ago» per la disvastigo de la internacia helplingvo Esperanto. Li gratulis la lernintojn de la kurso kaj instigis ilin daŭrigi la komencitan taskon. Per trafaj vortoj li speciale dankis la relacigeblan gvidinton de la kurso, k-don Piet Van Sitteren. Post kiam la prezidanto de «Nia Ideo» per trafa komparado estis klariginta al la ĉeestantaro la grandan signifon de Esperanto en la interfratiga movado, oni disdonis la belaspektajn diplomojn.

H. B. KEN.

La Sekreto de Karlo Van de Beek.

(daŭrigo)

Kiel mi antaŭe klarigis iru kaj rendezvous estas la samaj. La vorto **a c i e n** estas parto de la franca **p h a r m a c i e n** kiu signifas apotekisto, en la angla tekstro troviĝis la vorto **chemist** kies signifo estas la sama. **V i** kaj **y o u** estas similaj. La vorto **rez** estas parto de **c o n n a i t r e z**, ekscios; **m o n s e c r e t** mia sekreto. **W** estas el la fino de la vorto **kn o w**: scii, **m y** signifas mia. — Nur mankis tri literoj: **l a** kaj **e n** ĉe.

Se mi hieraŭ estus rompinta la botelon, mi certe estus ŝparinta al mi vojaĝon, ĉar se mi volis scii la sekreton, estis necese ke mi iru al Furnes. Sed okazis malfeliĉe malhelpo.

Kiam mi foriris por mia vojaĝo mi ne dubis pri ĝia sekvo. Tial mi elspezis mian tutan monon kaj ne estis eble havigi al

mi monon antaŭ la de l'monato.

Mi tiel multe interesigis pri la sekreto de Karlo ke mi tuj prenis la vagonaron por Antverpeno (5), kie loĝas mia amiko Ludeviko Walters. Mia amiko ĵus estis analizanta specimennon da ŝterko kiam mi eniris lian laborejon. Li petis mia pri la kialo de mia vizito. Mi klarigis la dokumentojn, kiujn mi trovis en la botelo kaj pruntoprenis de li la bezonatan monon por mia vojaĝo.

La sekvantan tagon mi denove forveturis al Furnes vizitonte la apotekiston pri kiu parolis la dokumentojn.

La urbo Furnes estas preskaŭ la sola kiu ne multe suferis pro detruado en tiu parto de la lando. Ĝi ne estas tre interesa; nur kiel rimarkindaj konstruaĵoj ni povas citi la stacidomon, la urbdomon kaj la ĉespreĝejon. La butikoj de la apotekisto staris sur la granda placo; mi petis la komerciston pri Karlo Van de Beek. La klarigo estis ke mia konatulo helpis la apotekiston dum libertempo. — Dum la tempo kiam li estis en la apotekejo Karlo tute malordigis la botelojn de iu ŝranko, petante al sia estro malhelpi la alligado de la aro.

Rigardante la ŝrankon mi vidis ke sur la supra tabulo staris la jenaj produktaĵoj en boteloj: Kloroformo, borakso, aluno, jodo, laktato de natrio, likopodo, edinolo, sulfuro, dekstrino, eferveska salo, fero, eozino, ricin oleo, morfino, anizo, laŭdano, ipekakuano, naftalino, emetiko, sublimato.

Nenia ordo ekzistis en tiu serio, do la ordo de la produktaĵoj devis sciigi ion. Se ni prenis la komencliteron de ĉiu produktaĵo, ni legus la jenan adreson: kbaillesdefermalines (6). La sep lastaj literoj kunmetitaj estis la nomo de la urbo en kiu mi loĝas. Estis du literoj pri kiuj mi ne tuj sciis. Karlo anstataŭis i per j. K nur povas kaŝi la numeron dektri aŭ dekvin.

Post dankoj al la apotekisto pro liaj klarigoj mi reforveturis hejmen.

La «Bailles de fer» estas larĝa strato apud la granda placo en Malines; ĝi estis parte detruita dum la milito. La numero dekonu ekzistas ankoraŭ kaj estas papervendejo. Neniu tie konis Karlon Van de Beek. La numero dekvin ne ekzistas; la domo, kiu portis tiun ciferon estas

(5) Antverpeno. — France: Anvers. Flandre: Antwerpen. La urbo kie okazis la sepa Internacia Kongreso. Haveno de Belgujo.

(6) Bailles de Fer. — Por la unueco en la nomoj mi ankaŭ uzas la francajn. Flandre: IJzerelenleen. Signifas: Fera apogilo.

tute detruita. En la nomaro de la enloĝantoj mi trovis ke la domo estis okupita antaŭ la milito de la familio Marien, kiu nun loĝas en la «Frederik de Mero-de» strato (7).

Kiam mi vizitis la domon en kiu loĝas la familio Marien (8), bluokula fraŭlino fraŭlino eliris ĝin. La patro kiu akceptis min kaj al kiu mipetis pri Karlo klarigis ke mia konatulo estas nevo de lia formortinta edzino. Ofte li vizitis ilin antaŭ sia militservo. Post klarigo de la dokumentoj per kiuj mi eksciis la nomon de Karlo mia kunparolanto diris al mi: «Mia filino de post sia reveno en Belgion malbone fartas. La kuracisto diris al mi ke ŝi nur bezonas distradon». «Mi zorgos pri tio, mi morgaŭ venos kaj vi prezentos min kiel nova kaj nekonata kuracisto» mi respondis. Tiel la proksiman tagon mi fariĝis Kuracisto.

(7) Frederik de Mérode. — Nomo de Belga heroo.

(8) Marien. — Vidu (1). Elparolu: Mari en. (daŭrigas)

NEKROLOGIO.

Antaŭ kelkaj tagoj mortis S-ro Verhoeven, patro de S-ino J. Karnas-Verhoeven.

A. P. P. K. esprimas al gesinjoroj J. Karnas-Verhoeven siajn plej simpatiajn kondolencojn.

GRATULOJ.

Okaze de la nomfesto de la Reĝo, S-ro D. Simons, polickomisario, malnova ano de «Suda Lumo» kaj unu el la pioniroj de de nia movado ĉe la policistoj, estis honorigita per la ordeno de Kavaliro de la Krono. Al la simpatia samideano A. P. P. K. sendas siajn plej sincerajn gratulojn.

RICEVITAJ

Amerika Esperantisto. — Usono. — Arguso. Mexico D. F. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro. — Bulgara Esperantisto, Sofio. — De Wereldtaal. Eemnes. — Hollanda Esperantisto. Amsterdam. — Hungara Esperantisto. Budapest VI. — Internaciaj Informoj. London W. C. I. — Internaciaj Informoj. Amsterdam. — Kolektanto. Eemnes. — L'Araldo Esperantisto. Italujo. — Le Semisto. Hispanujo. — Libero. Bulgarlando. — Liberpensulo. Leipzig. — L'P. T. T. Paris XVIII. — Litovia Stelo. Kaŭnas. — Nova Tago. Germanujo. — Norvega Arbeiter Esperantisten. Oslo. — Ora Epoko. Svislando. — Revuo Orienta. Tokio. — Svenska Arbetar Esperanten. Goteborg. — Svenska Esperantisten Tidningen. Stockholm I. — Vegeterano. Hamburg. — Wolnowyliciel. Pollando.